

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

LINGVO

La tipologio de
la japana

Surfado-
kurseto
en sep paŝoj

Ne forgesu min...
LA JARO
2002

Profitu de
nia oferto
(vidu paĝon 9)



Prezoj

		MONATO		LA JARO
		surf.	aere	aere
Aŭstralio	AUD	72	81	11
Aŭstrio	EUR	39	44	5
Belgio	EUR	39	44	5
Britio	GBP	29	32,6	3,6
Danio	DKK	298	336	38
Finnlando	EUR	39	44	5
Francio	EUR	39	44	5
Germanio (ok.)	EUR	39	44	5
Germanio (or.)	EUR	32	37	5
Hispanio	EUR	32	37	5
Irlando	EUR	39	44	5
Islando	EUR	39	44	5
Israelo	EUR	32	37	5
Italio	EUR	39	44	5
Japanio	JPY	5900	6760	860
Kanado	CAD	67	76	10
Luksemburgo	EUR	39	44	5
Nederlando	EUR	39	44	5
Norvegio	NOK	340	384	44
Nov-Zelando	NZD	82	92	12
Pollando	PLN	70	90	20
Portugalia	EUR	28	33	5
Sud-Afriko	EUR	32	37	5
Svedio	SEK	360	407	47
Svislando	CHF	65	74	9
Usono	USD	47	53	8

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopililo +32 32 33 54 33; retroŝto: admin@fel.esperanto.be.



- Rimedoj tute senkostaj:**
 - Se vi havas kurantan konton ĉe FEL, kiu estas kredita, simple petu ke ĝi estu debetita.
 - Se vi havas konton ĉe UEA, kiu estas kredita, sendu ĝirilon. La kontokodo de Flandra Esperanto-Ligo ĉe UEA estas fela-x.
 - Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran bankĉekon. En tiu okazo la valuto devas esti la usona dolaro.
- Rimedoj kiuj estas senkostaj en la alvenlando (Belgio) sed eble kostas en la forirlando (via lando):**
 - Petu vian poŝtoficejon pri internacia poŝtmandato je nomo de Flandra

Al kiu pagi?

al via landa peranto

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: esperfed@ans.com.au

Aŭstrijaj: AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: rudipueh@chello.at. • Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klostemeuburg. (pĉk. 7.127.144). R: apmarks@ping.at

Belga: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: admin@fel.esperanto.be.

Brazila: BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia (DF). R: bel@bmet.com.br.

Britaj: EAB, 201 Felixtowe Road, Ipswich IP3 9BJ, Britio (pĉk. 54 891 4007). R: eab@esperanto.demon.co.uk. • Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: paul@esperanto.freemove.co.uk.

Ĉeĥa: Vládslav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice. R: vlada_hasala@iol.cz.

Ĉina: *El popola Ĉinio*, P.O. Kesto 77, 100037 Beijing. R: libroservo@china-report.com.

Dana: Revuservo de DEA, c/o Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800 Nykøbing F, Danio. Tel.: +45 54 82 95 86/PTel.: +45 40 53 25 06. Rete: frederikeriksen@post.cybercity.dk.

Estona: Virve Ernits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.

Filipina: Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: fam.fuehrer@t-online.de

Finnaj: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647. • *Oy Mendoservo Ak*, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk. 427 72-2.

Francaj: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: esperanto-france@esperanto.org. • Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: maul@newsfactory.net. • Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: 115471-758 ĉe postbank Karlsruhe; bankkodo 660 100 75). R: fam.fuehrer@t-online.de. • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: RoBo.ESPERO@t-online.de.

Hispana: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2ª izda., Santander (BBVA: 0182-3800-33-0203548535).

Hungara: Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: akovacs@cosoft-bt.com.

Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.

Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: kleg@mvf.biglobe.ne.jp. • Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: jei@mro.biglobe.ne.jp.

Kataluna: KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: phopkina@uvic.ca

Korea: Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: koasi@soback.kornet.nm.kr. • Soula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: esperant@unitel.co.kr.

Kostarika: Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto miaumiau@sol.racsa.co.cr.

Kroataj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: mbolesev@public.srce.hr. • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: orbispictus@iol.it.

Latva kaj Litova: Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: stralaim@takas.lt.

Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: wicklor.albert@gmx.net.

Nederlanda: Libro-Servo Esperanto Nederland, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278). • UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: uea@inter.nl.net.

Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: esperanto@online.no

Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: Sir_Lancelot@compuserve.com

Portugala: PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa. R: ap.esperanto@clix.pt

Pola: *Skrību al la eldonejo* kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.

Rusa: Halina R. Gorecka, p.k. 67, RUS- 620077 Jekaterinburg-77. R: hrgo@sbank.e-burg.su

Slovenaj: Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: orbispictus@iol.it. • Jovan Mirković, Mima 5, SLO-2000 Maribor. R: j.mirkovica@siol.net

Sud-Afrika: Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: cbeckford@ppc.co.za.

Svedaj: Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: elna@esperanto-usa.org

Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: jebachrich@hotmail.com




aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

- Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
- Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, eeŭroj, tratitan je belga banko. Se la bankĉeko ne estas tratita je belga banko, aŭ se ĝi estas en alia valuto ol EUR, aldonu la egalvaloron de 10,5 EUR.
- Petu vian bankon pagi al KBC Antwerpen Belgio, SWIFT-kodo "KREDBEBB", por konto 402-5510531-55.
- Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili estas akireblaj en la plimulto de la poŝtoficejoj de la mondo. Unu kupono, nur maldekstre stampita de la poŝtoficejo, aŭ tute ne stampita, valoras 0,79 EUR.

3. Rimedoj kiuj kostas en la alvenlando:

- Se vi posedas kreditkarton Eurocard, Visa, Access, Fujicard au Mastercard, eblas pagi citante la numeron kaj la validodaton de la karto. Tiuj kiuj volas uzi PGP-ĉifradon por sendi la donitaĵojn, povas peti la publikan ŝlosilon de FEL per simpla retroŝto. De pagoj per kreditkarto subtrahiĝos 3 % pro administraj kostoj.
- Se vi havas poŝtĉekkonton, vi povas pagi al konto n-ro BE66 0000 2653 3843 de Flandra Esperanto-Ligo. Aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj.
- Por limigi la bankkostojn, vi povas pagi pli altan sumon. La tro pagita mono eniros konton vian, pri kiu vi povas disponi por estontaj mendoj.



Estimataj gelegantoj,

Vi scias, ke artikolojn aperintajn en MONATO oni povas legi parte ankaŭ en nia hejmpaĝo. Nun ni iris paŝon plian: de kelka tempo MONATO estas eldonata ne nur en formo de papera magazino, sed ties tekstoj (sen ilustraĵoj) estas sendataj ankaŭ rete al petantoj. Provizore la reta versio estas senkosta, ĉar la funkciado estas ankoraŭ testata. Verŝajne ekde la unua de januaro 2002 la servo iĝos pagenda. Ekzistas du retaj versioj: la askia kaj la unikoda. La askia versio estas legebla per la plej bazaj tekstiloj de ĉiuj komputiloj kaj sen bezono de iuj apartaj tiparoj. Ĝi uzas la tiel nomatan x-surogaton. La unikoda versio uzas la XHTML-normon kaj povas esti legata per modernaj krosiloj kiel Netscape aŭ Internet Explorer kaj per poŝtiloj kiel Outlook Express. Por aliĝi al la askia versio vi sendu retmesaĝon al servilo@fel.esperanto.be kaj skribu en la temlinio la jenajn du vortojn: *subscribe monato-x*; por aliĝi al la unikoda versio sendu retmesaĝon al servilo@fel.esperanto.be kaj skribu en la temlinio la jenajn du vortojn: *subscribe monato-xhtml*. Se vi volas ion demandi, skribu al monato@fel.esperanto.be. Kiel mi skribis antaŭ kelka tempo pri *El Popola Ĉinio*, reteldono ne povas anstataŭi paperan revuon. Do nia retversio estas nur aldona servo. Avantaĝo estas ke oni povas legi tekstojn antaŭ alveno de la kajero – do io por senpacienuloj. Kaj homoj, kiuj pro iuj kialoj ne povas aŭ volas aboni la paperan magazinon, povas tamen legi ĝin. Ni do deziras multe da legoplezuro!

Sincere via Stefan Maul

leteroj	4
el mia vidpunkto	5
- La ekstrem-potenco	
politiko	6
- EŬROPA UNIO: „Ne” al Nico	
- JAPANIO: Venkas populareco	
- LITOVIO: Porhoma homo	
- INTERNACIAJ RILATOJ: - Tamen la koro ne malesperas ... - Prezidantoj premias	
- ALBANIO: Murdo de la jarcento ▶	
- <i>Opinio: Bezonataj: saĝaj politikistoj, ne saĝaj bomboj</i>	
ekonomio	10
- ĈINIO: - Tro luksa pakumo - Konsumo de infanoj	
- POLLANDO: Junaj diplomitoj senlaboraj	
moderna vivo	12
- SANO: Esploroj kortuŝaj ▶	
- JAPANIO: Hontinda vizito	
- <i>Notoj: Ekologia iniciato en Vilnius</i>	
- <i>Opinio: Samseksemo, diskriminacio kaj homaj rajtoj</i>	
serio	14
- Historio de la ekonomika pensado / Parto 6: Makroekonomiko en la 20a jarcento	
medio	17
- BIOGASO: Danĝero kaj energifonto	
- Nubo-loĝantoj	
- <i>Notoj: Kun pli natura akvo al EU</i>	
scienco	18
- KURSETO: Surfado por komencantoj (<i>Kovrilo</i>)	
- Sablo-manĝulino	
- INTERRETO KAJ MALSANO: Risko pri sekse propagiĝantaj malsanoj	
- <i>Notoj: La plej granda romia urbo de Panonio ▶</i>	
poezio	20
- Poemoj de Edwin Grobe: Ok sonetoj el Navaholando	
lingvo	22
- TIPOLOGIO: La japana, bizara lingvo	
novelo	25
- de PEJNO Simono: La profeta kurso (Parto2)	
arto	28
- BULGARIO: Rava poezia mondo	
- KINO: Filmfestivalo en la patrujo de kino	
libroj	29
enigmoj	32
informoj de l' MONATO	33
ŝerco & satiro	34



Amnestia kritiko

Amnestio Internacia kritikis la ĉefan policon pro la agoj dum la kunsidoj de Internacia Mona Fonduso kaj de Monda Banko pasintjare septembre en Prago (MONATO, 2001/1, p. 12-13). La polico arestis grupojn da agresemaj radikaluloj, ĉefe tiujn, kiuj atakis la policanojn gardantajn la Kongresan Centron, en kiu la kunsidoj okazis. En la policdeĵorejoj oni traktis la arestitojn nehumane, humiligis ilin, batis ilin, ne permesis uzi necesejon, nek telefoni, kaj ne ebligis ĉeeston de advokatoj. La surstratajn tumultojn observis la t.n. civitanaj juraj patroloj, iniciatitaj de studentoj, sed tiuj ne rajtis ĉeesti en la policaj deĵorejoj kaj kontroli la konduton de policanoj. La polica estraro kaj la porparolanto de Ministrejo pri Internaj Aferoj rifuzis iun ajn kritikon, apogante sin sur la simpatioj de la publika opinio, kiu grandparte kondamnis la ekscesojn de la radikaluloj. Tamen estas necese rekoni, ke misagoj fare de policanoj okazis, kaj sekve estas urĝe necese la aferojn esplori. Ĉar puni kontraŭjurajn kondutojn de policanoj kontraŭ deliktuloj estas unuaranga afero de demokratia ŝtato. Jiří PATERA, Ĉeĥio

La fina bato

Unuaimpulse mi kredis ke Vatikano per la leteroj „Vatikano rebatas” (MONATO, 2001/2, p. 4) persone intervenis. Poste, relegante, mi reĝustigis kaj ektimis ke temas pri ironiaĵo pri reagoj kiuj pretendas defendi kaj interpreti *Dominus Iesus* kaj kontraŭi la opiniojn esprimatajn en MONATO. Fine duonneinda penso min ekokupis: suspekto (aŭ suspektigo?) ke la reagantoj estas pajlohomoj, nekapablaj pensi per sia kapo? Ĉu MONATO senvole venĝe moketas malaprobantojn?

ZECCHIN Armando, Italio

Koncerne alkoholaĵojn

La aserto „Fakuloj opinias ke ne estas prudente rekomendi eĉ ‘moderan’ drinkadon” (MONATO, 2001/4, p. 22) estas eraro, ĉar ankaŭ sur tiu ĉi kampo validas la ora mezo. Sciencaj esploroj pruvis ke en tipe vinproduktantaj landoj la nombroj de mortoj pro malsanoj de la koro kaj la sangocirkulado estas pli malaltaj ol en landoj kie oni konsumas malpli da seka ruĝa vino. Kompreneble la kondiĉo estas ke oni ĉiutage trinkas nur unu glason da vino (25 cl). Tiu, kiu prudente, modere trinkas vinon, eĉ pli profitas se intertempe li konsumas kon-

scie vitaminriĉan nutraĵon. Multaj valoraj kreaĵoj literaturaj kaj muzikaj estas plenumitaj kun modera konsumado de vino. Dume ankaŭ estas pruvoj ke vegetaranoj kaj abstinenculoj averaĝe ne vivas pli longe ol tiuj kiuj estas allogataj modere gustumi alkoholaĵojn aŭ viandaĵojn. Medicinaj malpermesoj kaj virtoreguloj promesas longan sed tamen enuan vivon. La fakton, ke konsumado de ete ebriigaj fluaĵoj povas signifi ankaŭ pozitivan aferon, devas kompreneble fanatikaj puritanoj nei. Daŭra bombardado per sankonsiloj kaj kondutoreguloj produktas hipokondriulojn kaj neŭrozulojn. Tial ili por multaj sentemuloj ne signifas pli longan vivon, sed nur pli malrapidan morton. Sen etaj pekoj ne okazas grandaj ĝojoj.

Bertil ENGLUND, Germanio

Dek du disĉiploj

FEL anoncis (MONATO, 2001/6, p. 23) ke ĝi interŝanĝos al eŭroj la monon de dek unu landoj. Ŝajne oni forgesis ke samtempe kun tiuj dek unu, ankaŭ Grekio transiros al eŭro.

André RUYSSCHAERT, Luksemburgo

Militaj krimoj aŭ politika oportunismo?

Mi legis la du reagojn (MONATO, 2001/6, p. 4) kontraŭ mia kontribuado „Ĉu vere burleskaĵo?” en la aprila numero. Videblas miskompreno de historiaj faktoj. Por la japanaj soldatoj dum la dua mondmilito instaliĝis bordeloj. Ili instaliĝis por preventi perfortaĵojn fare de soldatoj kontraŭ ordinaraj virinoj. La prostituitinoj (*ianfu* = konsolantinoj) estis krom japanoj ankaŭ koreanaj kaj tajvanaj (ambaŭ siatempe japanaj civitanoj) kaj aliaj. Kvankam nuntempe pro laŭta apelaciado pri homaj rajtoj tiu afero ne plu indulgeblas, siatempe ĝi konsideratis neeksterordinara.

Kompatindas la prostituitinoj forvenditaj de siaj gepatroj al prostituistoj pro malriĉeco kaj postenigitaj en militaj bordeloj. Klaras, tamen, ke ne temas pri perforta kuntreno fare de la armeo. Ili ricevis pagon por sia „servo”, kaj ankaŭ okazis regulaj fizikaj ekzamenoj. „Armeo kaj sekso” aferas universale. Similaj militaj institucioj troviĝis en nazia Germanio. Vaste konsciatas teruraĵoj de sovetaj soldatoj sen tiaj ejoj kontraŭ germaninoj en orienta Germanio tuj post la fino de la dua mondmilito. Tiusence la ekzisto de militaj bordeloj estis neevitebla malbono.

La bordeloj de la Japana Imperia Armeo estis konataj de iuj homoj kiel nejusta afero koncernanta armeon dum longa tempo post la fino de la milito. Neniam, tamen, leviĝis voĉoj akuzantaj kaj kondamnantaj tiun aferon. Ĉirkaŭ 1990 komencis japanaj maldekstruloj gvati tiujn bordelojn por eskapi de malapero el la politika areno dum disfalinta socialismo. Ili ne povis aserti suverenecon de sia ideologio kaj devis sin direkti al la kondamnado de la pasinteco de sia propra lando. Do, ili komencis serĉadi eks-prostituitinojn en Koreio kaj aliaj landoj, kaj urĝis al ili akuzi pri la japanan registaron por pardonpeto kaj kompenso.

Plue, ili apelaciis al amaskomunikiloj fikciante la imagon de „japana registaro rifuzanta pardonpeti kaj kompenzi al militaj prostituitinoj”. Japanaj amaskomunikiloj prie informadis eksterlandanojn kaj ilin persvadis per imago de „japana registaro apatia al konsolantinoj”. Dum la lastaj jaroj, tamen, en Japanio oni esploradis tiurilate, kaj evidentiĝis multaj fikcioj pri la afero. Nuntempe malmultas japanaj akuzantoj pri la afero escepte de iuj maldekstruloj. Eksterlande tamen, ankoraŭ vivas la „mito de *ianfu*”. Tio konstateblas el la du leteroj de eŭropanoj en la junia numero de MONATO.

Laste mi volas atentigi la legantojn pri tio, ke la „internacia tribunalo de virinoj pri militkrimoj” estas ne aŭtentika sed pseŭda tribunalo.

IGARASI Takeo, Japanio

Ne senmakule blanka

Ĉu mi rajtas atentigi pri erareto en la artikolo pri proverboj (MONATO, 2001/6, p. 19)? La germana por „griza barbo saĝon ne atestas” estas *ein weisser Bart zeugt nicht für Weisheit* (kaj ne *zügt*). En Svislando oni ne uzas la literon ß, kiu en Germanio kaj Aŭstrio anstataŭas la duoblan s post longaj vokaloj kaj diftongoj.

Frieder WEIGOLD, Germanio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (=zamenhofa!). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

guido@fel.esperanto.be

La ekstrem-potenco

Kiom bele klara estis la situacio fine de l' dua mondmilito! Ni havis kvin ŝtatojn, kiuj memdifine kaj laŭ karakterizo ĵurnalista estis tiel nomitaj grandpotencoj: Usono, Sovetio, Ĉinio, Britio kaj Francio. Baldaŭ tamen la Brita Imperio disfalis, Francio perdis siajn koloniojn, tiel ke ambaŭ ŝrumpis al ordinaraĵoj, Ĉinio pro kultura revolucio de Maŭ Zedong ne plu ludis gravan rolon sur monda scenejo. Poste, dum la periodo de l' malvarma milito restis du malamikaj grandpotencoj, Usono kaj Sovetio, kiuj per reciproka minacado garantiis pacon surtere.

Nenio sen Usono

Sed hodiaŭ? Post disfalo de l' sovetia imperio kaj komunisma bloko, el eksaj grandpotencoj restis nur unu: Usono. Ruslando falis en kvazaŭagonion, baraktante kun ĉiuspecaj internaj problemoj, Ĉinio ja estas grandega, sed havas similajn internajn problemojn. Laŭ aliaj, precipe ekonomiaj kriterioj nun Japanio kaj Eŭropa Unio (kun Germanio pinte) estas gigantoj de l' mondo, sed laŭ multaj aliaj gravaj aspektoj nur gnomoj kompare al elefanta nord-amerika ŝtato. Usono estas ne nur la lasta, sed ankaŭ la sola grandpotenco - kaj en tia situacio pli ĝuste estas, karakterizi ĝin ekstrem-potenco. Ĉu plaĉas al aliaj aŭ ne, ĉiuj dependas de tio, kio okazas en Usono kaj kion faras Usono.

Tamen la situacio estas eĉ pli konfuza, ĉar intertempe ni havas multajn grandpotencojn de atomarmiloj. Apud Usono kaj Ruslando, Britio, Francio kaj Ĉinio nun atomŝtatoj estas ankaŭ Ukrainio, Pakistano, Hindio, (sufiĉe certe) Israelo, (probable, eble) Nord-Koreio, Irako, Irano. Kio estas pri Sud-Afriko, kiu en la epoko de rasdisigado onidire posedis atomarmilojn, ni ne scias.

Rezisto vana

Tamen pli grava por la ordinara vivo de l' homaro ol eventuala minaco per agresemaj atomŝtatoj estas la ĉiutagaj aferoj. Se Usono havas ekonomian prosperon aŭ krizon, tio influas la tutan ceteran mondon, se la usona centra banko ŝanĝas rentumojn, la borsoj de Tokio ĝis Londono reagis; la kurzo de l' usona dolaro diktas la kurzon de komuna EU-valuto eŭro, spite al ĉiaj klopodoj de ties centra banko. Tutmondigon pli-malpli perforte realigas Usono laŭ siaj deziroj kaj bezonoj, la aliaj povas nur sekvi aŭ pere. Kaj

same, kiel ne eblas spiti la ekstrem-potencon sur kampoj de ekonomio kaj kapitalismo, la aliaj ŝtatoj kaj mondogrupoj ne kapablas politikajn kontraŭ la regantojn en Vaŝingtono.

La nova usona prezidanto George W. Bush [ĝorĝ dablju buŝ] plene ekspluatas sian fortan pozicion kaj rigore realigas tiujn planojn, kiujn li volas, kaj same rigore rifuzas tiujn internaciajn projektojn, kiujn li ne volas.

Ekzemple li ne nur reaktivigis la planojn por kontraŭraketa programo sed eĉ akcelas ĝin, fajfante pri hezitoj de amikaj ŝtatoj kaj kritiko de Moskvo kaj Pekino. Ekzemple li haltigis la projekton por plibonigo de l' monda klimato (laŭ protokolo de Kioto), simple deklaris ĝin „morta”, spite al ĉia kritiko de aliaj protokolintoj. Ekzemple li

anoncis nuligon de la traktato pri internacia puntribunalo, subskribita jam de lia antaŭulo Bill Clinton [klingtn].

Ne gravas en tiu ĉi kunteksto, ĉu Bush havas taŭgajn aŭ pli bonajn argumentojn - certe oni povas, ekzemple, diskuti ĉu la ABM-traktato (la traktato pri kontraŭbalistikaj raketoj) kun Moskvo estas malmoderna - aŭ ĉu Usono rompas aŭ vundas kontraktojn; gravas nur, ke Bush devas nek atenti nek respekti argumentojn, kritikon aŭ proteston de iu alia potenco, se li volas realigi kaj fari ion. Se Usono konstruas kaj instalas defend-raketojn, neniu povas malhelpi tion. Se Usono daŭrigas damaĝi la klimaton, la


protokolo de Kioto ne valoras la paperon sur kiu ĝi estas skribita, sed neniu kapablas eviti tion. Kaj kion valoras internacia puntribunalo, se la plej granda potenco de l' mondo ne agnoskas ĝin?

Rajto de fortulo

Rezisto de ekstere estas vana, tamen ankaŭ la usona prezidanto ne povas fari ĉion ajn, kio plaĉas al li. Se ekestas rezisto interne de Usono, li devas cedi; tio ekzemple jam okazis pri kelkaj projektoj, kiujn kontraŭis mediprotektaj grupoj. Sed ion tian ni ne povas atendi pri defend-raketoj aŭ monda klimato, ĉar tiukampe usonaj elektantoj plene aŭ plimulte kongruas kun sia prezidanto.

Ni aliaj povas priplori la situacion, sed ĝi estas tia: la sola ekstrem-potenco povas agi tute laŭ propra bontrovo kaj kontraŭ la interesoj de l' tuta cetera mondo. Ĉu plaĉas al ni aŭ ne, ni revenis al epoko, dum kiu la plej forta havas ĉiujn rajtojn - nun tamen sub signo de demokratio.

Stefan MAUL



EŬROPA UNIO

„Ne” al Nico

Post referendumo, en kiu irlandanoj (kvankam malmultnombre) rifuzis ratifiki la Traktaton de Nico, pluraj eŭropaj ĵurnaloj severe kritikis ilin.

Oni akuzis ilin pri egoismo kaj avareco, asertante, ke Irlando – iam unu el la plej malriĉaj landoj en okcidenta Eŭropo kaj nun, pro la aliĝo al la Eŭropa Unio (EU), unu el la plej riĉaj – domaĝas dividi sian prosperon kun aliaj, finance malpli evoluintaj ŝtatoj.

Kvankam en ĉiu nacio troveblas avaraj kaj ksenofobiaj unuopuloj, iu ajn longe loĝinta en Irlando scias, ke irlandanoj estas malavara popolo, kiu abunde kontribuas al ĉiuj bonfaraj organizaĵoj, al financa kaj praktika helpo al la tria mondo, kaj al pactaĉmentoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Evidente ekster Irlando oni ne komprenas la motivojn por la kontraŭa referendumo reago al la Nica Traktato.

Indiferentaj

Krom tio, ke la referendumo estis komplika pro samtempa balotado pri du aliaj demandoj (ĉu elleĝarigi la jam de jaroj ne uzitan eblon apliki mortopunon, kaj ĉu akcepti la aŭtoritaton de la internacia krimkortumo), estis aliaj

faktoroj. Unue, la registaro ne sufiĉe informis la publikon pri la signifo kaj celoj de la traktato, kaj eĉ (laŭ kritikantoj en la neantaj frakcioj) misinformis pri ties vera intenco. Do multaj ne komprenis la traktaton, dum aliaj restis indiferentaj kaj ne voĉdonis.

Aliaj, kiuj ja partoprenis la referendumon, voĉdonis ne kontraŭ enlaso de novaj ŝtatoj sed kontraŭ manko de informo, kontraŭ – laŭ ili – kreskanta EU-burokratismo en lando, kiu malamas burokratismon, kaj kontraŭ eŭropa federaciigo laŭ usona modelo. Plue, multaj nee voĉdonis pro kialoj aparte irlandaj. Irlandanoj ĵaluzas defendas sian statuson de neŭtrala nacio ene de UN kaj rifuzas alianciĝi – ekzemple al la Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Ili malfidas NATO-n, kaj timas, ke EU intencas krei eŭropan armeon kunlaborantan kun NATO aŭ sub ĝia regado. Tio estis la sinteno de la Verda Partio.

Abortigo

Samtempe piaj katolikoj kaj aliaj

suspektas, ke integriĝanta EU enkondukos leĝojn permesantajn liberan abortigon kaj pli facilan ekscediĝon. Fine, sed nelaste (ĉar ekzistas eĉ pliaj motivoj por neado), la naciisma respublikisma partio Sinn Féin [ŝin fejn], kiu multe fortigis sian potencon post la ĵusaj elektoj en Nord-Irlando, kampanjis kontraŭ plia eŭropa federaciigo pro la sama kialo, kiu igas ĝin malakcepti britan regadon en Nord-Irlando kaj postuli sendependecon.

Ŝajnas evidente, ke la plimulto da irlandanoj aprobas pliajn ŝtatojn en EU, inkluzive de landoj de meza kaj orienta Eŭropo (Pollando, Ĉeĥio, Baltio, Slovenio, ktp), sed superŝtata federacio restas nedezirata.

Garbhan MACAOIDH



Venko por Koizumi.

JAPANIO

Venkas populareco

Venkis en elektoj por la supera ĉambro de la japana nacia parlamento la konservativa Liberala Demokratia Partio (LDP), estrata de la populara ĉefministro Koizumi. LDP sukcese plialtigis sian seĝonombron en la nova ĉambro de 47 al 65. Aliflanke ŝrumpis subteno por la progresemaĵoj Japana Komunista Partio (de 15 al kvin seĝoj) kaj la Sociala Demokratia Partio (de kvin al tri). La japana nacia parlamento (japane: kokkai) konsistas el du ĉambroj: la malsupera ĉambro de deputitoj (shuugi-in) kaj la supera ĉambro de konsilistoj (sangi-in). Plej gravas la malsupera ĉambro.

IGARASI Takeo/pg



Irlando: ne al superŝtata federacio.

Bezonataj: saĝaj politikistoj, ne saĝaj bomboj

Balkanio restas plej danĝera regiono, kiu en la pasinta jardeko travivis kvar militojn. Provokis ilin Slobodan Milošević: en Slovenio en 1991, en Kroatio de 1991 ĝis 1995, en Bosnio de 1992 ĝis 1995, kaj en Kosovo de 1998 ĝis 1999. Nun ekzistas danĝero pri kvina Balkan-milito, ĉi-foje en Makedonio. Eŭropanoj kaj usonanoj havas malklaran politikon rilate la regionon kaj tiu ĉi malklareco plifortigas la timojn kaj samtempe la pretendojn de ĉiuj partioj en la konfliktoj.

Kion fakte postulas eŭropanoj: pli grandajn multetnajn ŝtatojn aŭ ĉiam pli malgrandajn kaj etne pli purajn komunumojn? La senfortecon oni proklamas kreiva malklareco. Alia principo postulas maksimume rapidan retiriĝon el la regiono. Rezulte surlokuloj provizore kaŝas siajn ambiciojn, sen rezigni pri la finceloj. Retiriĝo-strategio regule estas ŝanĝata per komunikado de nova retiriĝdato. Do trupoj de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO) devis resti en Bosnio kaj Hercegovino unu jaron, tamen tie restadas jam pli ol kvin jarojn.

La internacia komunumo, kiu sendis al Kosovo 40 000 soldatojn, same ne baldaŭ retiriĝos.

Oni nun parolas pri 30-taga interveno en Makedonio. Oni politikis ĉefe kontraŭ Milošević – sed nun, kiam Milošević estas arestita, necesas, ke okcidento formulu tute novan Balkan-politikon. Simple reagi al jam okazintaj eventoj evidentiĝis esti nesufiĉa kaj malsukcesa. Bezonataj estas saĝaj politikistoj, ne saĝaj bomboj, kiel diris antaŭ nelonge Carl Bildt [karl bildt], UN-sendito por Balkanio.

Tri principoj

Inteligenta Balkan-politiko devus baziĝi sur tri principoj. Unue, ke la internacia komunumo certigu al si la eblon trankvile „enspiri”. En Bosnio kaj Hercegovino estas paco

nur pro tio, ke ne funkcias la unueca strukturo, kiun antaŭvidas la t.n. kontrakto de Dayton. Serboj, kroatoj kaj bosnianoj loĝas preskaŭ izolitaj unu de la alia. Centra registaro estas malforta, ekonomio malbona: el 1,2 milionoj da fuĝintoj revenis nur tri procentoj. Same en

Kosovo. Laŭ rezolucio de la sekureca konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (UN), Kosovo plu estas parto de Jugoslavio, tamen reale ĝi estas aŭtonoma UN-protectorato. Tien neniu revenas, kaj serboj plu fuĝas el Kosovo. Okcidente de tiu ĉi regiono, ĉirkaŭ Mitrovica, formiĝas dua Respubliko Serba (post tiu en Bosnio). La regiono fakte restas dividita. Se internaciaj trupoj retiriĝus el Bosnio kaj Hercegovino, jam morgaŭ tie eksplodus nova milito.

La dua principo jenas: ĉiuj landoj en la konfliktoj en Balkanio taksas la malstabilan pacon daŭrigo de la milito per aliaj rimedoj. Se la internacia komunumo ne engaĝiĝos per aktiva politiko, Balkanio ĥaosiĝos. Oni vidus – tiel avertas Carl Bildt – venĝeman Serbion, partigitan Bosnion kaj

Hercegovinon kaj dissolviĝintan Makedonion. Tiukaze NATO devus prepari sin por senfinaj malgrandaj militoj, kio finfine korodos Eŭropon.

Reedukado

Sekvas la tria principo. Paco, libereco kaj bonstato en Balkanio eblos nur en alianco kun Eŭropa Unio (EU). Stabileco-pakto pri sud-orienta Eŭropo, jam estigita, estas pozitiva paŝo. Sed EU devus ekrespondeci pri reformoj kaj repacigo. Kadre de la hodiaŭaj protectoratoj tio povus fariĝi perforta kuratoreco, pura kontrolado simile al la kuratorado super Germanio post la dua mondomilito, kiam kune kun la ekonomia restariĝo oni ekokupiĝis pri reeduko de la homoj.


Balkanio estas granda defio por Eŭropo: tamen kiel partnero Usono bonvenas.

Tamen oni realismu kaj rekonu, ke frue malfrue Usono forlasos Balkanion. Tial stabiligo de Balkanio restas eŭropa devo. Tio postulas longdaŭran engaĝon. Se Eŭropo rifuzos pacigi en sia „antaŭĉambro”, la eŭropa ideo pri integrado multege suferos. De la agoj aŭ malagoj de la 15 EU-ŝtatoj dependas, ĉu estonte la mondo serioze traktos Eŭropon.

Evgeni GEORGIEV



Soldatoj de UN-trupoj en Kosovo: kontraŭbatalas etnajn ekstremulojn en la je albana kaj serba partoj dividita urbo Mitrovica.



Slobodan Milošević: eksa jugoslava prezidento, antaŭ la UN-tribunalo pri la militkrimoj en Jugoslavio en Hago.



Carl Bildt: speciala UN-sendito por Balkanio.

Porhoma homo

Iama sekretario de komunista partio kaj iama nacia prezidanto fariĝis ĉefministro de Litovio. Algirdas Brazauskas, 68-jaraĝa, ekestris en januaro unuiĝintan litovan socialdemokratian partion kaj en julio transprenis respon-



Estras la 12an registaron en Litovio eksa prezidanto Algirdas Brazauskas.

71 mandatojn el 141-persona parlamento. Kolapsis la antaŭa koalicio pro malkonsento inter la partneroj pri planata privatigo kaj pri la rolo de ŝtataj gas- kaj energio-kompanioj.

Frakcioj

Post la demisio de la liberala registaro parlamentaj frakcioj de Nova Unio, Socialdemokrata Koalicio, Kamparana Partio kaj Nova Demokrata Partio proponis al la prezidanto kandidatecon de Brazauskas por la ĉefministra posteno. La kandidatecon subtenis 84 parlamentanoj. Brazauskas mem, iama komunisto, promesis orientiĝi nek al oriento, nek al okcidento, sed al la ordinara homo en Litovio.

Samtempe li ĵuris daŭrigi la reformojn en Litovio kaj efike administri la landon. Opinio-sondaĵoj montras, ke Brazauskas estas unu el la plej popularaj homoj en la lando.

Laimius STRAŽNICKAS / pg

econ pri la 12a litova registaro.

Tiel finiĝis la koalicio inter Nova Unio kaj Liberala Unio, kiu kreiĝis pasintjare por kontraŭstari la socialdemokratojn.

En la nuna parlamento la tiel nomata nova politiko havas

Tamen la koro ne malesperas ...

„Ne la sopirata tagiĝo,” kriis la ĉeftitolo de la tagĵurnalo *The Times of India*, kiam kolapsis en julio diskutoj inter Pakistano kaj Barato. Eĥante tiel verson el poemo urdua de Faiz Ahmed Faiz [fejz], la ĵurnalo spegulis la akran seniluziigon ne nur de la popoloj de la du landoj sed ankaŭ de ĉiuj, kiuj deziras finon de la malamo kaj perforto inter tiuj ĉi du najbaroj.

Ĉio bone aŭguris, kiam la prezidanto de Pakistano, Pervez Musharraf, alteriĝis en Nov-Delĥio. Barataj ĉefministro Atal Behari Vajpayee [vaghpajj] kaj prezidanto K. R. Narayanan [narajan] varme akceptis la generalon, kiu lanĉis antaŭ du jaroj militon inter tiuj ĉi nukleaj potencoj. Musharraf vizitis la hejmon, kie li naskiĝis antaŭ la landa divido en 1947, kaj la estroj kunmanĝis en la helega lumo de amaskomunikiloj.

Amo kaj memoro

La diskutoj okazis en Agra, la urbo de la Taj Mahal [taĝ mahál], monumento al amo kaj memoro. La pakistana tagĵurnalo *Dawn* raportis, ke Vajpayee deklaris: „Ni kaptu tiun ĉi freŝan ŝancon



Pervez Musharraf.

pri Kaŝmiro – regiono, pri kiu militis la du landoj tri fojojn ekde la sendependiĝo el Britio. Pakistano asertis, ke centre de la disputo staras la „statuso” de tiu ĉi norda subŝtato; por Barato, tamen, gravas la „situacio”. La du prezidantoj renkontiĝis ses fojojn en Agra sed finfine malsukcesis interkonsenti eĉ pri rutina fina komunikaĵo.

Sed poste la ministroj pri eksterlandaj aferoj de ambaŭ ŝtatoj pli pozitive taksis la pintan renkontiĝon, anoncante, ke Vajpayee iros jam ĉijare al Pakistano por daŭrigi la dialogon. Oni ripetu la vortojn de la poeto Faiz: „La koro ne malesperas, nur senpovas / Longas la nokto sufera, sed nur noktas”.

A.Giridhar RAO

Prezidantoj premias


En la ĉefurbo de Slovenio, Ljubljana, okazis meze de junio la unua renkontiĝo de la prezidantoj de la du plej potencaj mondaj fortoj (laŭ armila senco): Usono kaj Rusio. Elektiĝinte, la usona prezidanto George Bush longe prokrastis renkontiĝon kun sia rusa malulo Vladimir Putin. Necessis unue decidi pri neŭtrala renkonteĵo: ambaŭ konsentis, ke bona loko estas Slovenio.

Kredeble ili volis tiel

premii malgrandan Slovenion pro ĝia 10-jara modela vojo al demokratio. Nome en junio ĉi tiu lando festis la

10-jariĝon de la tago, kiam ĝi proklamis sian sendependecon. De tiu momento ĝi atingis gravajn ekonomiajn kaj politikajn sukcesojn.

La renkontiĝon sekvis 1100 ĵurnalistoj el la tuta mondo. La du prezidantoj traktis mondajn temojn kaj ĉefe



Busch kaj Putin konferencis en Slovenio.

interkonsentis pri lokoj kaj tempoj de du pliaj renkontiĝoj. La prezidantoj havis ankaŭ mallongajn interparolojn kun la gastigantoj, la prezidanto de Slovenio

Respubliko Milan Kuchan kaj la registarprezidanto Janez Drnovšek.

Zlatko TIŠLJAR



ALBANIO

Murdo de la jarcento

En Tirana, Albanio, vekis grandan intereson la t.n., „afero Hajdari”.



Hajdari: kiu lin murdis?

Azem Hajdari estis la unua gvidanto de la Demokrata Partio, kies lanĉo en 1990 enkondukis en Albanion politikan pluralismon. Hajdari estis studento, kiu – kiel aliaj gvidantoj de opoziciaj grupoj – kuraĝe kaj sentime alfrontis atakojn de la tiam agonianta ekskomunisma reĝimo.

Inter 1992 kaj 1997 li kunlaboris kun Sali Berisha, la unua prezidanto demokratie elektita en Albanio. Post la „revolucio” de 1997 demokratoj eniris la opozicion, sed Hajdari restis aktiva batalanto por libereco, justeco kaj demokratio. Li senmaskigis en kaj ekster la parlamento la koruptecon kaj mafiecon de la novaj regantaj socialistoj kaj manifestaciis kontraŭ la novkomunisma registaro starigita en junio 1997.

Pro tio lia vivo estis minacata. En septembro 1997, ĉe la parlamentejo, socialista deputito kvar fojojn pafis kaj grave vundis lin. Oni arestis la atencinton, kiu estis poste kondamnita al enprizonigo. En februaro 1998 policistoj pafis kontraŭ veturilon de Hajdari, tiam estro de parlamenta komisiono pri defendado, dirante, ke liaj akompanantoj kontraŭleĝe portis armilojn. Kelkaj policistoj estis arestitaj. Poste la parlamento, estrata de socialistoj kaj

ties alianculoj, pro falsaj pretekstoj senigis Hajdari-n de lia deputita imuneco.

Komplica

Ĉio finiĝis en septembro 1998, kiam oni ruze alvokis Hajdari-n – simbolon de nova erao en Albanio – al la sidejo de la Demokrata Partio kaj tie mortpafis lin. Kvankam atestantoj tuj informis la policon, tiu – verŝajne komplica – ne reagis. Tiel eskapis la murdintoj. Incitite, popolamaso atakis la ĉefministrejon: iam Hajdari diris, ke mortigos lin la tiama ĉefministro, Fatos Nano. Sed tiu jam fuĝis al Makedonio kaj ĉe la ĉefministrejo oni trovis neniun.

Serioze okupiĝis pri la „afero Hajdari” nek la prokuratorejo nek aliaj ŝtatorganoj. Regis indiferenteco pri – laŭ la albana verkisto Ismail Kadare – la „murdo de la jarcento”. Tamen lastatempe, kadre de naciaj balotoj, malfermiĝis en Tirana juĝproceso pri la afero. Malgraŭ tio, ke estas arestitaj kelkaj policanoj, neniu kredas ke, dum regas socialistoj, la afero estos juste esplorata. Tamen la proceso mem fariĝos eventuale bazo por nova, definitiva kaj decidiga esploro, kiam regos politikaj fortoj nekoruptaj kaj nerilataj al ekskomunistoj. Bardhyl SELIMI

Ne forgesu min...



- diverslandaj festotagoj
- lun-fazoj
- aliaj informoj



Donacu ĝin al viaj amikoj!
Rabato de 33% por sendaĵo de 3 ekzempleroj aŭ pli.



LA JARO

praktika Esperanto-agendo

formato 10x15cm; prezo: vidu p.2
mendu ĉe FEL, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen

butiko@fel.esperanto.be

+ 32 3 233 54 33

ĈINIO

Tro luksa pakumo

Al iu maljunulino antaŭ nelonge okazis malagrablaĵo. Ŝia filo donacis al ŝi skatolon da sanigaj herboj, kiu entute valoris kelkcent juanojn.

La pli ol 20 herboj, mallongaj kaj maldikaj, tamen estis enmetitaj en granda skatolo. Rigardante la iom malplenan skatolon, ornamitan per ruĝa silko kaj orkolora nilono, la maljunulino sentis, ke nek forĵeti la skatolon, nek konservi ĝin, estus taŭge.

„Por enmeti iom da drogherboj, oni faris la skatolon tiel granda kaj delikata, kaj ekipis ĝin eĉ per du seruretoj. Forĵeto de ĝi estus vera malŝparo, sed restigo ne alportos alian uzon.” Post longa hezito ŝi ne forĵetis la belegan skatolon, sed metis ĝin sub sian liton.

Ĉiea fenomeno

Iu ĵurnalisto speciale iris al pluraj

supervendejoj kaj magazenoj en Ŝanhajo por tie esplori la komercadon. Li trovis, ke la fenomeno, ke varoj surhavas tre luksan eksteran pakumon kaj ke pakmaterialoj estas tro malŝpare uzataj, videblas ĉie.

En vendejo de donacoj sur Nanjing-strato, vendisto prezentis al la ĵurnalisto skatolon da fammarkaj medikamentoj. La skatolo estis 66 cm alta kubo; en ĝi troviĝis kvar malgrandaj skatoloj. Fakte estis nur 48 piloloj. La vendisto ĝentile klarigis: „Oni aĉetas medikamentojn por donaci, sed samtempe oni ankaŭ volas paradi. Ju pli granda estas la skatolo, des pli bone estas por la donacanto.”

„Mi sentas, ke mi elspezis monon



EL POPOLA ĈINIO

Konsumo de infanoj

En februaro 2001 la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio faris enketon pri la konsumado en la grandaj urboj Pekino, Ŝanhajo, Xi'an kaj Chengdu.

La enketo montris, ke en la tuta lando la infanoj en aĝo de nulo ĝis 12 jaroj ĉiumonate havas konsumon super 3,5 miliardoj da juanoj (0,49 miliardoj da eŭroj). Nur en Pekino, la infanoj sub la aĝo de 12 jaroj dum unu monato konsumis 1,4 miliardojn da juanoj.

Belaj vestaĵoj gravas

Zorgeme beligi infanon iĝis tre grava afero en la familia vivo. La granda plimulto de la familioj malŝpare elspezas monon, por ke iliaj infanoj vestiĝu kiel eble plej bele.

Koncerna eduka fako pasintjare faris esploron pri fammarkaj vestoj en dekelkaj bazaj kaj mezaj lernejoj. Ĝi trovis, ke inter la enketitaj infanoj pli ol duono posedas almenaŭ unu kompletan de fammarkaj



Infanoj elspezas pli ol plenkreskuloj.

vestoj. 30 % havas du aŭ tri kompletojn, kaj 10 % eĉ pli ol kvar.

El la bazlemejanoj 92 % aĉetas manĝeton ofte kaj laŭdezire. Nur 8 % ne emas.

Dum la enketado oni ankaŭ trovis,

ke infanoj preferas importitajn varojn. Pri la konsumo de vestoj kaj manĝaĵoj el eksterlando la pekinaj infanoj okupas la unuan lokon en la lando. Por tio ili ĉiumonate elspezas 500 milionojn da juanoj.

Infano estas la ĉefa kosto

Laŭ la enketo nun en trimembra familio la konsumo por la infanoj fundamente decidas la konsumon de tiu familio. En 80 % de la salajrularaj familioj, post dekalkulo de la necesaj elspezoj, la monata meznombra konsumo de la infanoj tre multe superas tiun de la plenkreskuloj.

En Pekino, urbego kun alta vivkosto, la famiilestroj estas devigataj elspezi almenaŭ duonon de sia totala familia enspezo por vivteni infanon, por ke ĝi eniru infanĝardenon aŭ lernejon kaj ekskursu en ferioj kaj festoj.

Edukistoj montris, ke favoraj vivkondiĉoj necerte havigas al infanoj bonajn kvalitojn. Espereble la famiilestroj iamaniere limigos la konsumon de la infanoj kaj al kutimigos ilin al ŝparemo en la vivo. MU Binghua

kvazaŭ nur por aĉeti pakumon” iu kliento, kiu estis elektanta varojn, plendis al la ĵurnalisto. „Nun pakumoj de tre multaj varoj, precipe de varoj sanigaj kaj nutraj, pli kaj pli grandiĝas kaj komplikiĝas. Ofte okazas, ke tri aŭ kvar pakskatoloj estas uzitaj nur por unu varo nemultvalora. Pliiĝo de pakumo efektive kaŭzas prezleviĝon de la vara tutaĵo. Donacoskatoloj plejparte havas belan aspekton, sed malfermite, entenas grandajn pecojn da ŝaŭmplasto. Kiam iu ricevas skatolon da nutraĵo, venas al li ankaŭ amaso da pakmaterialoj.”

Arbarego por pakumi ĉemizojn

Kvankam pakumo estas vesto de varo kaj povas beligi ĝin, tamen por simpla varo troa pakumo ne nur pliigas la koston, sed ankaŭ kaŭzas grandan malŝparon de naturaj riĉfontoj.

Koncerna ŝtata departemento faris kalkuladon kaj montris, ke nun en nia lando ĉiujare la produktokvanto de enskatoligitaj ĉemizoj estas 800 milionoj. Iliaj skatoloj bezonas 240 000 tunojn da papero. Kun arbo de dekcentimetra diametro kiel kalkula normo, kaj sciante ke sepopo da tiaj arboj povas estigi po unu tunon da papero, por havi 800 milionojn da skatoloj, oni forhakis 1,68 milionojn da arboj. Laŭ la kalkulo, nia lando do ĉiujare nur por la enskatoligitaj ĉemizoj perdas vastan arbaron.

En sia intervjuo la ĵurnalisto rimarkis ankaŭ, ke plejparto de la konsumantoj tre konsentas, ke por komercaĵoj produktantoj devas uzi pakumojn simplajn kaj praktikajn. Ili opinias, ke ne estas grava la bela pakumo, se la varo aĉetita estas nur por uzo de aĉetanto mem aŭ ties familianoj. Se la varo estas donaco, ĝia pakumo ja postulas belecon, sed tia beleco devas esti modera, ĉar plej grava estas la kvalito de la varo mem. Ĝia ekstera pakumo povas nur aldoni ian oportunon, ekzemple por transporti kaj fiksi, sed tio ne anstataŭas la varon mem.

Ĉi-jare la Ĉina Konsumanta Ligo prenas „verdan konsumon” kiel la temon de sia aktivado kaj emfazas, ke la konsumado estu en akordo kun ŝparo de energio kaj protekto de ekologia medio.

Sed, laŭ enketo, nuntempe plimulto de la ĉinaj konsumantoj havas nebonan konsuman kutimon. Strebi al bela ŝajno evidente ne helpas atingi la celon „verda konsumo”. Produktistoj, komercistoj kaj konsumantoj, ĉiuj kune devus agadi por ŝpari troan pakumon.

MU Binghua

POLLANDO

Junaj diplomitoj senlaboraj

La 10an de aprilo 2001 en la pola publika televido TVP 1, Leszek Miller, estro de la pola socialisma partio (SLD, Koalicio de Demokratia Maldekstrularo), diris ke estas nuntempe du mitoj en Eŭropo. Unu ekzistas en Germanio pri tio ke post la aliĝo de najbara Pollando al Eŭropa Unio (EU), polaj laboristoj diluigos Germanion per ofertoj labori malmultekoste. Laŭ la alia mito la germanoj foraĉetos la polan teron, malpli koston ol tiu en Okcidento.

Vere estas tiaj mitoj en la tiel nomata publika opinio, sed ĉu ili estonte, post pli bona ekkonigo de la ekonomiaj cirkonstancoj en ambaŭ najbaraj landoj, povos resti nur mitoj?

Nebezonataj fakoj

En Pollando je la komenco de la jaro 2001 ĉiu tria senlaborulo estas en la aĝo de 18 ĝis 24 jaroj. En tiu grupo estas multaj gediplomitoj: 176 000 laŭ ciferoj de la Landa Laboroficejo. El la plej nova komunikado de la oficejo oni povas ekscii ke unu el la kaŭzoj de la alta indico de senlaboreco inter gejunuloj estas la fakto, ke ili elektas tiajn fakojn, je kiuj malestas bezono en la labormerkato.

Pli ol duono de la senlaboraj diplomitoj finis postgimnaziajn mezajn faklernejojn kaj dujarajn postelementajn faklernejojn.

82 % de la gejunuloj kiuj registrigas sin en laboroficejoj tuj post fino de la lernado, havas fakon je kiu ne estas bezono.

La granda ekinteresiĝo pri ekonomiaj faklemejoj antaŭ kelkaj jaroj kaŭzis, ke nun gravajn malfacilaĵojn ekhavi laborpostenon havas geekonomiistoj. Fine de la jaro 2000 kiel senlaboruloj registriĝis 9000 el ili. Alia tia fakoj estas vendist(in)o kun 8000 registritaj senlaboruloj.

Pli rapide trovas laboron diplomitoj de altlemejoj, kiuj pli facile ŝanĝas siajn kvalifikojn ol tiuj kiuj havas „konkretan profesion”. Tamen ankaŭ ĉe tiuj la senlaboreco pligrandiĝas.

La plej grandajn malfacilaĵojn ha-

vas loĝantoj de vilaĝoj kie mankas entreprenoj kaj transportrimedoj.

En decembro de la jaro 2000 por ĉiu laborpropono adresita al laboroficejo estis meznombre 88 senlaboruloj. Oni antaŭvidas ke ĝis la jaro 2005 por gejunuloj finontaj lemejoj devus esti 3,5 milionoj da novaj laborlokoj.

Ambaŭ flankoj tro postulemaj

Laŭ Mikaelo Rabikowski de la Landa Laboroficejo dungantoj kaj laboristoj havas problemojn. Laboradanto volas laboristojn kun sperto, kiun freŝe diplomitoj verŝajne ne havas. Aliflanke, junuloj havas altajn pagpostulojn. Ĉiu diplomito deziras labori en la eklernita fakoj.

Dum la pasintaj jaroj estis organizitaj multnombraj pluklerigaj kursoj. Plej malefikaj estis tiuj pri komputila priservo, administra priservo kaj vend-



Miller (SLD): ne timas la polan estontecon.

istoj. Plej sukcesaj estis kursoj por priservo de konstruaj maŝinoj kaj por stiristoj, lignaĵistoj kaj veldistoj.

Senlaboreco inter gejunuloj nuntempe ne estas nur pola problemo. Simila indico estas en Italio (30,3 %), Finnlando (28,3 %) kaj Hispanio (25,7 %). Malpli da problemoj por akiri laborlokojn havas diplomitoj en Aŭstrio kaj Nederlando kun respektive 4,1 % kaj 4,9 % da senlaboruloj.

El la nombro de ĉiuj laborokapabluloj en Pollando nun ĉ. 17 % estas senlaboruloj. Verŝajne polaj gejunuloj post aliĝo al EU serĉados laboreblecojn ekster sia lando, ankaŭ en najbara Germanio.

Stanisław ŚMIGIELSKI

SANO

Esploroj kortuŝaj

Ĉiutage homoj kolapsas pro kormalsano aŭ kordifekto, plej ofte pro korventrikla taĥikardio (tro alta frekvenco de korbatoj). Sen tuja sukuro tiuj homoj mortas post nur malmultaj minutoj.

Jam de jarmiloj oni scias, ke per taŭgaj metodoj sukuro povas haltigi la morton. Dum faraona tempo en Egiptio oni revivigis homojn, malfermante la buŝon per hoko kaj enmetante t.n. fingron de Horuso (tubon oran aŭ arĝentan) en la traŝejon kaj enblovante spiron. Hebraj akuŝistinoj revivigis – aŭ, pli trafe, pluvivigis – ĵus naskitajn bebojn per spirodonado buŝal-buŝa.

Ĉevalo

Dum pasintaj jarcentoj oni elprovis bizarajn revivigajn metodojn, ekz. uzante barelon, sur kiu oni ruligis pacienton senvivan, aŭ metante korpon sur dorson de ĉevalo por tiel ĝin skui. Indianoj aplikis inversan metodon: ili plenigis bestan vezikon per „magia” fumo kaj enblovis tiun en la postaĵon de paciento. Laŭdire tiu ĉi metodo sukcesis kaj en 1767 oni komencis apliki ĝin en Anglio.

Hodiaŭ oni sukuras unue per senhezita spirodonado kaj ritma korprenado, ĝis – almenaŭ en evoluinta lando – venos ambulanco ekipita de aparatoj, kiaj EKG (elektrokardiografo, por vidigi la staton de la koro) kaj defibrilatoroj (kiuj per elektra ŝoko stimulas la koron). Tiel estas savitaj ĝis 40 % de la pacientoj.

Oksigeno

Lastatempe aperis en Interreto raporto pri revivigo per korprenado sen spirodonaco. En Usono universitataj sciencistoj prilaboris dokumentojn kaj protokolojn de 241 pacientoj, kiujn oni provis revivigi sen spirodonaco kaj sole per korprenado. La informojn oni komparis kun dokumentoj pri 279 personoj, al kiuj oni krome donis oksigenon. En la unua grupo transvivis 10 %; en la

dua 15%: laŭ la sciencistoj diferenco tute ne grava.

Tamen en Seattle, kie oni faris la esplorojn, bone funkcias la ambulanca servo. Trejnitaj helpantoj povas atingi viktimojn inter tri kaj kvar minutoj: tiam ankoraŭ restas oksigeno en la pulmoj, kaj aldono de plia, pura oksigeno sufiĉas por savi la viktimon. Sed en aliaj landoj la kondiĉoj malsamas. Ekz. en Germanio ambulanco atingas pacienton post meze ok ĝis 14 minutoj. Dum tiom da tempo paciento suferas gravan oksigeno-mankon: la cerbo estas jam difektita kaj la eblo transvivi preskaŭ nulas. Jomo IPFELKOFER



Urbaj instancoj en Vilnius, ĉefurbo de Litovio, aĉetis 500 biciklojn kaj, ilin oranĝkoloro farbinte, disponigis ilin al civitanoj. Tiel la urbestro, Arturas Zuokas, celas ne nur stimuli uzadon de ekologia transportilo sed ankaŭ solvi parkuman problemon en la urbocentro. La kelkmonata iniciato tiel funkcias: ĉiu havanta pli ol 12 jarojn rajtas uzi biciklon inter la 5a kaj 22a horoj tamen nur laŭ difinitaj vojoj. Policisto, vidante oranĝkoloran biciklon for de signita vojo, petos, ke oni tuj tien revenu. Post la 22a horo bicikloj estu enŝlositaj en specialaj ejoj. Kelkaj kredas, ke la bicikloj estos ŝtelitaj. Tamen la urbestro diris, ke li fidus vilniusanojn kaj ke krome la iniciato bone elprovos ilian moralo-senton.

LAST

Hontinda vizito

La 15an de aŭgusto 1945 Japanio estis venkita en la dua mondomilito. Dum la milito 3,5 milionoj da japanoj mortis. Memore al tiu ĉi tago kaj al la mortintoj la registaro ĉiun jaron okazigas ceremonion. Samtage ministroj vizitas la ŝintoisman templon Yasukuni.

Ĉi-jare eĉ ĉefministro Koizumi deklaris, ke li vizitos la templon. Lia kialo tre simplas: „Mi estas tre korduŝita, kiam mi imagas la mortintajn soldatojn, kiuj devis iri al batakampo for de siaj familianoj. Kial oni tiel kritikis agon por estimi militfalintojn?” La deklaro reagis diversmaniere japanojn kaj ankaŭ homojn en aliaj aziaj landoj.

Kio estas la ŝintoisma templo Yasukuni (ĝi signifas „sekurigi kaj trankviligi la regnon”)? La antaŭa formo de Yasukuni estis fondita en 1869 por respekti la falintojn, kiuj batalis por la imperiestro en la interna milito antaŭ la japana moderniĝo. En 1879 ĝi ekapartenis al la japana armeo, dum aliaj ŝintoismaj temploj apartenis al la

ministrejo pri internaj aferoj.

Apoteozataj

Tiel ĝi ekzistis por puŝi la japanan popolon al milito. En la templo estis apoteozataj soldatoj kaj militservantoj, kiuj mortis por la imperiestro: civilaj mortintoj kiel viktimoj de atombomboj kaj

Post la mondomilito la japana kon-



La ŝintoisma templo Yasukuni.

aeratakoj estis

stitucio garantias liberon de la kredo. De tiam Yasukuni fariĝis privata religia sekto, sed dum la pasintaj 50 jaroj dekstremaj partioj ĉiam provas meti Yasukuni sub regado de la registaro kaj tiel oficialigi ĝin samkiel antaŭ la milito. La vizito de la ĉefministro al Yasukuni klare atencas la konstitucion, kiu apartigas politikon kaj religion kiel unu el ĝiaj principoj.

Alia problemo estas, ke en Yasukuni estis sekrete apoteozitaj gravaj milit-

krimuloj. Vizito de la ĉefministro signifos, ke li aŭ Japanio ne pardonpetas al aziaj landoj pri la japana militkrimo. Mortis en aziaj landoj 20 milionoj da homoj; falis „nur” 3,5 milionoj da japanoj. Simple kalkulite, unu japana soldato mortigis preskaŭ 6 homojn. Se Koizumi vizitos Yasukuni sen pardonpeto al aziaj

militmortintoj, tio estos granda insulto al aziaj popoloj kaj nepre kaŭzos grandan indignon. HORI Jasuo

OPINIO

Samseksemo, diskriminacio kaj homaj rajtoj

Tra la jaroj, jam plurfoje mi ricevis leterojn el diversaj landoj, ankaŭ de legantoj de MONATO, ofte de homoj komplete nekonataj al mi, kiuj ie / iam legis teksteton mian koncerne respektadon de samseksemaj homoj. Foje temas pri poemeto mia, pri artikoleto, pri prediko aŭ tradukaĵo.

Regule oni komencas tian leteron, menciante certan miron, ke mi – estante pastoro protestanta – povas defendi tian vivoformon. Ŝajne oni atendas de pastoroj, ke ili senescepte vivas kaj pensas laŭ stilo ege malnovmoda, konservativa aŭ eĉ reakcia. Nu, tia certe mi nek estas, nek volas esti.

Profunda mistero

Laŭ mia kompreno pri la kristana mesaĝo – tio, kion mi lernis persone de Jesuo Mesio – estas malhumane kondamni iun ajn homon simple pro tio, kio li aŭ ŝi estas. Ni homoj nek fabrikis nek inventis nin mem, sed ni ĉiuj estas kreitaj de Dio – la profunda mistero malantaŭ ĉio ekzistanta: nomu kiel vi volas! Kaj kiel kreitaĵoj ni estas prezentataj, ĉiuj senescepte, unu al la alia kiel kunhomoj sur tiu ĉi nia komuna „kosmoŝipo” tero.


Do, tute principe – kaj por mi persone tio estas unu el la bazaj aferoj de mia fido je Dio – neniu homo el si mem, kvazaŭ herede, aŭtomate, denaske, ktp estas pli valora ol alia homo. Jen la homaj rajtoj en nuksoŝelo! Kiel afero de la fido!

Sed, foje oni plu miras, kial tiel obstine vi ĉiam denove tuŝas tiun temon? Intertempe vi ja jam montris vin avangardisma! Se temas nur pri mia persona imago-bildo, mi certe delonge jam silentus pri ĝi. Sed temas pri milionoj da homoj tra la mondo, al kiuj oni ne lasas normalan por ili vivmanieron – simple kun partnero amata, se dezirate.

Kalejdoskopio

Ankaŭ politike la temo „homaj rajtoj” fariĝas ĉiam pli grava. Estas tuta vico da ŝtatoj, kiuj strebas aliĝi al Eŭropa Unio, precipe el la eŭropa landaro eks-komunisma. Kaj ĝuste ĉe tiaj intertraktadoj grave rolas la demando pri homaj rajtoj: kiel ili kondutas precipe al siaj malplimulto. Kaj da tiaj malplimulto ekzistas tuta kalejdoskopio: naciaj / etnaj (hungaroj en Rumanio; albanoj, serboj, kroatoj kaj multaj aliaj en plej diversaj partoj de la eksa Jugoslavio; rusoj en Estonio, ktp; judoj en multe da landoj; kaj kion pri la ciganoj de la Roma- kaj Sintipopoloj?), religiaj malplimulto (ortodoksianoj, romkatolikoj kaj islamanoj ree en eksa Jugoslavio; protestantoj en Greklando; kaj kion pri la preskaŭ-ŝtateco de ortodoksio en Ruslando?), kaj do ankaŭ – sed ĉie – la samseksemaj homoj.

Ĉi tie mi ne menciis alian temon, kiun plurfoje mi tuŝis: la pozicion de la virinoj, ne nur socie sed eĉ pli religie. Eble pri tio foje mi verkos; ankaŭ tiutere ne ja multo ŝanĝendas. Tiel longe, dum ni homoj ankoraŭ ne respektas niajn kunhomojn kiel homojn – simple pro la nura fakto, ke ili ekzistas – nia mondo riskas ne multe adoltiĝi. Gerrit BERVELING



Historio de la ekonomika pensado

Parto 6

La 4 unuaj partoj de la serio aperis en MONATO 2 ĝis 5/2001.

Makroekonomiko en la 20a jarcento

La novklasika ekonomiko, tia kia ĝi estis kelkajn jardekojn post la komenco de la 20a jarcento, estis esence teorio pri ekonomio en kiu regas plena okupateco. Eĉ ekonomikistoj kiel Knut Wicksell kaj Irving Fisher, kiuj vigle engaĝiĝis en publikaj debatoj pri sociaj problemoj, preskaŭ tute ellasis la problemon de senlaboreco el sia scienca analizo. Oni neglektis unu el la plej evidentaj sociaj demandoj.

Kiel klarigi tion? Unu kaŭzo certe estas, ke senlaboreco iasence ne estas ekonomia problemo. Ekonomio laŭ kutima difino temas pri la arto racie uzi malabundajn rimedojn. La problemo de senlaboreco ja estas kontraŭa: Troviĝas rimedoj – laboristoj – pli abunde ol la merkato deziras. La tradicia teorio estis netaŭga por analizi tiun problemon.

Iom post iom ekonomikistoj tamen vekigis, parte pro la grandaj depresioj de la 1920aj kaj 1930aj jaroj. En Svedio grupo de junaj ekonomikistoj kiel Gunnar Myrdal kaj Bertil Ohlin (Nobel-premiitoj en 1974 kaj 1977 respektive) en la t.n. Stokholmskolo defiis siajn instruistojn de la pli aĝa generacio pro ties troigitita fido je la kapablo de nebridita merkato. La Stokholmskolo analizis la kaŭzojn de senlaboreco ekde la 1920aj jaroj. Simile, Michał Kalecki publikigis gravajn ideojn en la pola lingvo. Tamen, internacie pli konata fariĝis parenca analizo de la anglo John

Maynard Keynes [ĝon mejnad kinz] (1883-1946).


La revolucio de Keynes

Keynes elkreskis en bonhava medio karakterizata per optimismo kaj kredo ke la mondon povas ŝanĝi la intelekta elito, al kiu lia familio apartenis. Li studis i.a. matematikon kaj ekonomikon en Cambridge [kejmbriĝ]. Post siaj studoj li laboris alteme en la ŝtata administracio kaj kiel universitatano. Same kiel pluraj aliaj elstaraj britaj ekonomikistoj, li fariĝis nek doktoro nek plenrajta profesoro.

Post kelkaj iom malpli konataj libroj, Keynes en 1936 publikigis *The General Theory of Employment, Interest and Money* (La ĝenerala

'La ideoj de Keynes pluvivis kaj naskis idojn'

teorio pri okupateco, interezo kaj mono). Li diris en la unua frazo, ke la vorto *ĝenerala* estas grava. Per tiu vorto li volis akcenti, ke dum lia analizo estas ĝenerala, la antaŭa novklasika analizo konsideris nur apartan kazon, nome la kazon kiam plena okupateco regas.



John M. Keynes analizis la senlaborecon.


La libro ŝanĝis la manieron pensi pri makroekonomikaj demandoj. Paul A. Samuelson priskribis en 1946 kiel li memoris la aperon de la libro: „*The General Theory* surprizis la plej multajn malpli ol 35-jarajn ekonomikistojn per la furiozeco de malsano, kiu unuafoje tra-



Paul A. Samuelson.

fas kaj reduktas tribon, vivantan en plena izoliteco. Montriĝis, ke la pli ol 50-jaraj ekonomikistoj estas tute imunaj kontraŭ tiu malsano. La intera aĝogrupo estis plejparte trafita de febro, ofte sen konisian sanstato aŭ sin konfidi al iu.”

Kio do estis la ĉefa mesaĝo de Keynes? Unue li emfazis, ke la nivelo de okupateco kaj produktado dependas ĉefe de la efika postulado, t.e. la efika aĉetvolvo en la ekonomio, ne de la produktadkapacito. Krome, ne estas ia aŭtomata tendenco en la ekonomio krei plenan okupatecon. Povas esti ekvilibro en la senco ke la produktado egalas la postuladon de varoj kaj servoj je malpli ol plena okupateco. Unu el la kaŭzoj ke malaltigo de salajroj ne aŭtomate restarigas plenan okupatecon estas la fakto ke salajroj estas ne nur kostoj. Malaltigo de salajroj malaltigas ankaŭ la efikan



Milton Friedman: reprezentanto de monetarismo.

postuladon, la konsumadon kaj la okupatecon.

Kvankam laŭ Keynes oni ne povas fidi la kapablon de netuŝata merkata mekanismo krei plenan okupatecon, li estis optimisma pri la eblo sukcese interveni. Per politikaj rimedoj kiel malaltigo de impostoj kaj interezoj aŭ pliigo de ŝtataj investado kaj konsumado eblas pligrandigi la totalan postuladon kaj sekve la produktadon kaj okupatecon en la ekonomio. Do, la ŝtato faru aktivan ekonomian politikon por eviti depresiojn kaj grandan fluktuation de la konjunkturo.

La ideoj de Keynes pluvivis kaj naskis idojn. Sed ili ankaŭ renkontis defiantojn.

La monetarismo

La plej forta defianto estis la monetarismo. La nomo aludas al tio, ke laŭ la monetarismo la kvanto de mono en la ekonomio estas decida por la prez-nivelo, kaj fluktuation de la

kvanto de mono estas grava kaŭzo de la konjunkturŝanĝoj.

La plej konata reprezentanto estas Milton Friedman, profesoro ĉe la universitato de Chicago kaj Nobel-premiito en 1976. Friedman ĉiam estis fervora apologiisto de libera merkato. Tio kred-eble kontribuis al lia malfavora sinteno al la ideoj de Keynes, ĉar tiuj ja neevit-eble kondukas al ampleksa ŝtata intervenado en la merkaton. Klopodoj stimuli la ekonomion per ŝtata produktado dum malalta konjunkturo ne estis laŭ la gusto de la monetaristoj.

Sed la kritikaj argumentoj estis ne nur ideologie motivitaj. Dum la 1970aj jaroj la kejnismo renkontis kreskantan ĝeneralan kritikon pro sia malkapablo klarigi tiun novan fenomenon, kiun oni nomis stagflacio, t.e. kombino de granda senlaboreco kaj alta inflacio. Ekestis timo, ke politiko laŭ la ideoj de Keynes kaŭzos daŭre kreskantan inflacion sen povi daŭre redukti la senlaborecon.

La monetarisma revolucio – aŭ kontraŭrevolucio – en kelkaj rilatoj faris nur alian emfazon ol Keynes kaj la posta kejnismo, kaj en aliaj rilatoj fundamente diferencis. Ni vidu kelkajn punktojn.

Dum Keynes rigardis la efikan postuladon kiel la plej gravan faktoron malantaŭ la nivelo de la produktado, la monetarismo akcentis la disponon pri produktadrimedoj kaj la teknika nivelo. Vario de la postulado ĉefe influas la inflacion.

Merkata ekonomio laŭ Keynes esen-


Makroekonomiko: tiu parto de la ekonomio kiu temas pri altgrade sumigitaj grandoj kaj la rilatoj inter tiuj. Ekzemploj de tiaj grandoj estas inflacio, totala senlaboreco kaj malneta enlanda produkto.

ce estas malstabila. Laŭ la monetarismo ĝi estas esence stabila, kaj la fortoj de libera merkato garantias pli-malpli optimuman uzadon de la produktadrimedoj. Tial ne necesas detala interveno por direkti la konjunktur-venon por direkti la konjunktur-venon. Plej grave estas, ke la kvanto de mono en la ekonomio kresku same rapide kiel la malneta enlanda produkto kreskas longaperspektive.

Interveno per konjunkturpolitiko riskas, laŭ la monetarismo, pligravigi la problemojn. Unu kaŭzo estas la tempoperdo en diversaj paŝoj. Tempo pasas inter ŝanĝo en la ekonomio kaj la observado de tiu ŝanĝo en la statistiko. Tempo pasas inter ekonomi-politika interveno kaj la efiko de tiu interveno. La efiko de ekzemple interezosŝanĝo de la centra banko aperos eble post unu jaro. Stimula interveno en malalta konjunkturo eble efikos sur la ekonomion nur kiam ĝi sen interveno montrus altan konjunktur-venon. Tial la interveno povas kaŭzi tro „varman” konjunktur-venon kun granda inflacio.

Simile, mildiga interveno en alta konjunkturo eble efikos sur la konjunktur-venon nur kiam ĝi spontanee estus malalta kun granda senlaboreco. Tiel la amplitudo de la konjunktur-variado povas pligrandiĝi anstataŭ malpligrandiĝi pro la aktiva politiko.

La opinio de la monetaristoj kompreneble ne restis sen objektoj. Franco Modigliani [franko modiljani], unu el la



Friedrich von Hayek: elstara nomo de la nov-aŭstra skolo..



Nixon: „Ni ĉiuj estas kejnŝanoj”.

ĉefaj oponentoj de Friedman kaj Nobel-premiito en 1985, konstatis ke nemonetaristoj opinias ke la ekonomio „bezonas esti stabiligata, povas esti stabiligata, kaj tial devas esti stabiligata”.

Aliaj kontraŭintervenismoj

Monetarismo ne estis la sola kontraŭintervenisma skolo. Pli ekstrema sed malpli influa estis la nov-aŭstra skolo kun Friedrich von Hayek [fridriĥ fon hajek] (Nobel-premiito en 1974) kaj Ludwig von Mises kiel plej elstaraj nomoj. Pli influa fariĝis la pensmaniero kiu ricevis la epiteton nova klasika makroekonomiko kun Robert Lucas, Nobel-premiito en



Thatcher kaj Reagan: apogantoj de monetarismo.

1995, kiel unu el la gvidaj personoj. Ĝi akcentis, ke la makroekonomiko devas havi mikroekonomikan teorion fundamenton, kaj estas kelkfoje karakterizata kiel rezulto de palaca revolucio ene de la monetarisma kampo. Precipe en Usono, ĝi dum certa periodo plimalpli dominis la makroekonomikan teoriumadon.

Alia skolo, parte parenca al la monetarismo, ricevis malpli da estimo de la plimulto de ekonomikistoj sed apogon en dekstremaj politikaj medioj. Temas pri „ofertado-ekonomiko”, kies plej konata reprezentanto estas la usonano Arthur Laffer, iam ekonomikisto en la administracio de prezidento Nixon.

Laŭ tiu skolo stimulo de la postulado en malalta konjunkturo per mona politiko aŭ ŝtataj investado kaj konsumado tute ne helpus. Due, mildigo de impostoj havus tre grandan stimulan efikon sur la ekonomion. Malaltigo de la impostprocento povus kreskigi la ekonomian aktivecon multe, eĉ tiom ke la enkasigitaj impostenspezoj kreskus. Montriĝis malfacile trovi konfirmon pri tiu ideo en la realo.

La praktika politiko

En praktika ekonomia politiko, la unuaj jardekoj post la dua mondmilito estis karakterizataj de diversaj variaĵoj de kejnŝismo en multaj nesocialismaj landoj. Eĉ la usona respublikano Richard Nixon klarigis, ke „ni ĉiuj estas kejnŝanoj nun”. En la fino de la 1970aj kaj komence de la 1980aj jaroj monetarismaj kaj aliaj kontraŭintervenaj ideoj estis akceptitaj en la ekonomia politiko de pluraj registaroj kaj naciaj bankoj.

Du nomoj fariĝis simboloj de tiu transformado: Margaret Thatcher, kiu fariĝis ĉefministro en Britio en 1979, kaj Ronald Reagan, kiu fariĝis prezidento en Usono en 1981. La plej klara praktika monetarismo tamen ne daŭris multajn jarojn. La posta praktiko montras kaj kejnŝismajn kaj kontraŭkejnŝismajn erojn, sed evidente estas, ke la ideoj pri detala ŝtata direktado kaj ampleksa ŝtata posedado ĝenerale havas multe malpli fortan apogon ol dum la unuaj postmilitaj jardekoj. Temas ne nur pri konjunkturpolitiko. Malreguligo kaj privatigo fariĝis kvazaŭ modvortoj. Bo SANDELIN

Pli ampleksa versio de tiu ĉi serio estos eldonita baldaŭ de la germana eldonejo Leins Verlag sub la titolo „La historio de ekonomika pensado”.

Monato

KONEKTIĜI

▶▶ KOLOFONO

La bazaj informoj pri MONATO.

▶▶ SPECIMENOJ

Specimenaj tekstoj el MONATO.

▶▶ TARIFO

Kotizoj de MONATO en la diversaj landoj.

▶▶ PERANTOJ

Perantoj de MONATO al kiuj vi povas pagi vian kotizon.

▶▶ ABONILO

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de MONATO, aŭ se vi simple volas plilongigi vian abonon, uzu tiun ĉi praktikan abonilon!

▶▶ REDAKTOROJ

Redaktoroj de MONATO al kiuj vi sendu viajn manuskriptojn.

▶▶ MANUSKRIPTOJ

Kiel sendi viajn manuskriptojn al la redaktoroj de MONATO.

▶▶ KONVENCIOJ

Lingvaj kaj ortografiaj konvencioj de MONATO.

▶▶ ANONCOJ

Anonctarifoj de MONATO.

▶▶ INDEKSOJ

Indeksoj de MONATO por trovi aperintajn artikolojn.

▶▶ RADIO POLONIA

Mencioj kaj recenzoj pri MONATO en Radio Polonia.

▶▶ ETIKO

Etika kodo de ĵurnalismaj principoj (agnoscita de MONATO).


24 HOROJ

TTT: <http://monato.esperanto.be>

BIOGASO

Danĝero kaj energiofonto

Dum jarmiloj la homoj ĵetis organikan rubon en truojn aŭ amasigis ĝin kiel rubmont(et)ojn.



li ne sciis, ke la organika rubo, ĉefe de dommastruma origino, malkomponiĝas, fermentas, putras pro ago de bakterioj kaj longtempe produktas kaj emisiadas venenajn aŭ eksplodemajn gasmiksaĵojn (ĉefe metanon kun karbondioksido), hodiaŭ nomatajn biogaso. Samtempe la libere deponita organika rubo povas disvastigi malsanojn, eĉ epidemiojn.

Multfoje oni jam konstruis domojn sur forgesitaj rubodeponejoj. La rubogaso tiam povas penetri en kelojn kaj kaŭzi malsanojn de la enloĝantoj aŭ eksplode neniigi la konstruaĵon. Tamen estas eblo uzi ilin kiel biogason, do modernan brulaĵon. Tion oni eltrovis jam antaŭ plurdek jaroj, sed nuntempe ties aplikado disvolviĝas.

La biogason oni povas trakti diversmaniere:

- ▶ Simple bruligi – tamen sub kontrolataj kondiĉoj por eviti fajrodamaĝojn. Tiam certe la kemia energio de la biogaso senutile perdiĝas.
- ▶ Kolekti la biogason kaj poste uzi ĝin.
- ▶ Produkti varmon.
- ▶ Produkti elektran kurenton.

Estas notinde, ke tiuj metodoj bone fermas la putraĵon de la eksteraĵo, do la medio ne estas endanĝerigita per infektaj efikoj.

En Vieno oni sekvas la unuan kaj kvaran metodojn kaj jam kolektas 60

elcentojn de la deponeja biogaso, kiu konsistas ĉefe el metano CH_4 . Jare estiĝas 11 milionoj da kubometroj da biogaso, el kio 58 elcentojn oni simple forbruligas. La resto estas uzata por produkti elektran energion, kvante 9,5 milionojn da kilovathoroj.

La biogaso estas kolektata kaj utiligata jene:

La rubon oni amasigas sur pli-malpli akvo- kaj aerizola, horizontala aŭ milde dekliva, grundo. Sur la rubmonteton oni sternas plastan folion kun tere kovrita rando por ke la gaso nur malfacile komunikiĝu kun la ekstera aero. Oni kovras la tutan monteton per grundotavolo por ebligi ties kovron per natura plantaro. En la rubon oni boras vertikalajn truojn, t.n. gasputojn. Jam la puto havas filtran mantelon, sed poste la gaskolekta dukto kondukas la biogason al filtra-pumpa instalaĵo, post kiu la gaso atingas brulejon. Plej primitive, la varmenergion povas turni vapormaŝinon aŭ vaporturbinon. Pli moderne oni ne produktas vaporon, sed kondukas la gason rekte al eksplodemotoro aŭ gasturbino, en kiu lasta ĝi kontinue brulas. La maŝino elektita el la menciitaj turnas elektran generatoron. La produktata kurento tra transformatoro atingas la preskribitan tension kaj fluas en la regionan elektran reton, kiu povas kontaktiĝi kun la tutlanda aŭ internacia retego.

Walter KLAG

BIOLOGIO

Nubo-loĝantoj

Oni jam delonge scias, ke la nuboj donas hejmon al mikroorganismo-kolonioj. Nun oni konstatis, ke ili ankaŭ kreskas kaj dividiĝas. Esploristoj de la Universitato de Innsbruck, Aŭstrio, sub gvido de Birgitt Satler, trovis averaĝe 1500 diversajn bakteriojn (glob-, bastonetkaj faden-formajn) en unu mililitro da akvo de nubaj gutoj. Kaj ĉar ilia dividtempo estas pli mallonga ol la averaĝa vivdaŭro de la nuboj, estas klare ke ili eĉ reproduktiĝis en la nuboj, kion cetere subtenas ilia surprize granda nombro. Oni provas determini ilian devenon, ĉu temas pri bakterioj vivantaj sur plantoj, surface de la oceanoj aŭ en la grundo. Surbaze de tiu novaĵo Daniel Jacob, aerkemiisto de la Universitato Harvard, komente diris, ke la vivagado de la bakterioj povas kontribui al la produktado de ozono. Nome la bakterioj produktas karbonilojn, kiuj sub efiko de lumo disfalas en liberajn radikalojn, kaj tiuj kreskigas la ozonproduktadon. OH

Kun pli natura akvo al EU

La Naturprotekta Mondfondaĵo (WWF) taksas tre bona la staton de la riveroj, lagoj kaj aliaj malsekaj terenoj en Hungario kaj kvar aliaj landokandidatoj de la Eŭropa Unio. Laŭ la raporto la stato de la dolĉakvoj de tiuj landokandidatoj multaj akvoj estas en pli bona, pli natura stato ol en tiuj en EU, kaj ilia riĉa viva mondo alportas pluan specio-variecon al EU. La raporto juĝis ekologie elstare bona la staton de la riveroj Rába (Hungario) kaj Hornád-Hemád (Slovakio-Hungario). OH





KURSETO

Surfado por komencantoj

La reguloj de la surfado estas simplaj. Tamen komencu tiun arton ĉe ondoj ne ŝaŭmantaj kaj ne pli altaj ol 50 centimetroj, akompanate de spertulo aŭ instruisto pri surfado.

Unue

Kiam la ondoj venas pli-malpli rekte al la sabla bordo, prenu la surf-tabulon, iru kun ĝi en la akvon ĝis-genuo kaj tie kuŝigu la tabulon sur la akvon, kun la „nazo” kontraŭ la ventantaj ondoj.

Due

Kuŝigu vin surventre sur la tabulon, vizaĝe kontraŭ la ondoj.

Trie

Remu per ambaŭ manplatoj kontraŭ la ondojn, kvindek metrojn. Ĉiam kiam ondo proksimiĝas, subtenu vian bruston per etenditaj brakoj, tiel ke la ondo ne trafu vian nazon, sed la bruston.

Kvare

Returnu rapide la tabulon, naze al la bordo, atendu ian pli altan ondon, kaj kiam tiu estas proksimiĝanta, plej forte komencu remi per viaj manplatoj direkte al la bordo, tiel ke la ondo-rapido, relative al vi, estu malgranda. Se vi remas sufiĉe rapide, la ondo jam ne trakuras sub vi, sed la tabulo kun vi estos iom levata

de la ondo, kaj vi restos kun la tabulo sur la deklivo de la ondo-frunto. Kaj la tabulo estos premata, akcelata kaj post sekundo jam daŭre ŝovata de la ondo. Vi jam estos flosanta samrapide kiel la ondo. Plua remado ne necesos.

Kvine

Zorge, sed iom rapide ekstaru mane-genuo, poste mane-piede, fine nur piede sur la tabulo, kun unu piedo iom antaŭe, alia iom malantaŭe, kaj ekvilibrigu vin per la brakoj iom horizontale etenditaj. La genuoj estu iom fleksitaj. Per la piedoj alĝustigu kaj tenu la tabulon iom oblikve al la kresto de la ŝovanta ondo. Tiel vi povas moviĝi ankaŭ dekstren-maldekstren antaŭ la

ondokresto, dume senĉese proksimiĝante al la bordo.

Sese

Se vi sentas perdi la ekvilibron, tuj desaltu flanken de sur la tabulo per malstreĉitaj iom fleksitaj genuoj por eviti vundiĝon sur eblaj roketoj elstarantaj el la sablo de la fundo, kaj metu ambaŭ manojn super la kapon por eviti rektan kolizion kun la senbridiĝinta tabulo. Same vi faru, se venas kontraŭ vin alia surfadanto (kio cetere estas severe malpermesita).

Sepe

Kiam vi jam estas en la akvo, provu permane kapti la tabulon, kaj naĝu, poste marŝu kun ĝi al la bordo.

Se vi bone balancas kaj ekvilibrigas vin, kaj do ne defalas, vi povas senprobleme atingi la bordon. Sed kelkajn metrojn antaŭ ĝi kliniĝu, kaptu ambaŭmane la randon de la tabulo, perpiede desaltu en la ĝisgenuan akvon kaj marŝu kun la tabulo al la bordo.

Jen la scienco pri surfado.

HASZPRA Otto



Sablo- manĝulino

La 52-jara Stanislava Montsviliene el la litova vilaĝo Gomaliai apud la urbo Telsiai asertas, ke de unu jaro ŝi havas strangan kutimon: ŝi kun granda plezuro manĝas sablon. Cetere sen akvo, ĉar ŝi neniam trinkas multe da likvaĵo. Same ŝi ne tre konsumas ordinarajn manĝojn, ĉar jam antaŭe ŝia stomako malbone digestadis ilin.

Pro la putrecaodoro la edzo kaj la filo ne toleras la sablon en la kuirujo, do tie ŝi ne manĝas ĝin. La sablo-sitelo ŝi tenas en la brutejo. Komence ŝi modeste konsumis la sablon, sed nun ŝi bezonas ĉirkaŭ 30 kilogramojn semajne. „Frandaĵo”, ŝi diras pri ĝi kaj asertas, ke plej bone estas manĝi alterne puran sablon kaj tiun miksitajn kun argilo. Bongustan sablon ŝi trovas sub pino kreskanta apud ŝia domo.

La sablomanganta virino ĝojas, ke la sablo por ŝi estas ankaŭ kuracilo. Ŝi ne plu sentas ventrodolorojn, kiuj turmentis ŝin dum kelkaj jaroj, malaperis kapturino, kaj eĉ pliboniĝis vido. Ne unu kuraciston ŝi demandis dezirante ekscii, de kie venis tiu stranga emo. Bedaŭrinde eĉ ne unu povis klarigi la kialojn de tia nekutima bezono. Iuj malrekomendas daŭrigi tiun agadon kaj timigas ŝin per antaŭdiro de diversaj malsanoj; aliaj, kontraŭe, aprobas ŝian konduton.

LAST



INTERRETO KAJ MALSANO

Risko pri sekse propagiantaj malsanoj?

Interretantoj plej ofte interesiĝas pri pornografiaĵoj. Tio fariĝis jam iaspeca tutmonda manio. Ĉu tio prilumas nur la pensmanieron de tiuj homoj, aŭ ĉu eble ĝi atentigas ankaŭ pri danĝeroj rilate la korpan sanon?

La prestiĝa usona revuo *JAMA* en sia numero de la 26a de julio 2000, publikigis esplorrezultojn pri la riskoj rilate al la ofteco de sekse transdonataj malsanoj ĉe personoj uzantaj la Interreton por sendo kaj ricevo de seksrilataj alvokoj. Usona servo por konsilado kaj testado pri aidoso, inter septembro 1999 kaj aprilo 2000, enketis inter centoj da klientoj pri ilia uzo aŭ neuzo de Interre-

to por serĉi aŭ trovi seksajn partnerojn, por taksu la riskon de malsaniĝo depende de ilia retuzo. Oni konstatis, ke la personoj uzantaj Interreton tiacele estis pli ofte samseksemaj viroj, kiuj emis al pli riskaj seksaj kondutoj, do faris pli multnombrajn kontaktojn, suferis pli da sekse propagataj malsanoj (ankaŭ aidoso) ol tiuj, kiuj kutime renkontas partnerojn sen tiucela uzo de Interreto.

Oni konkludis, ke la emo serĉi sekspartnerojn per uzo de Interreto indikas, ke la risko de la koncerno je sekse propagataj malsanoj estas pli granda ol de iu, kiu ne uzas Interreton tiucele.

Paulo S. VIANA

La plej granda romia urbo de Panonio

Unu el la plej esperigaj historiaj esplorfosadoj okazas proksime al la aŭtoŝoseo M1, inter Budapeŝto kaj la lago Balatono, apud la hungara vilaĝo Tác pri la panonia urbo Gorsium [gorzium]. Oni scias pri ĝi de 1860. La

malkovrado komenciĝis antaŭ 44 jaroj laŭ malrapida ritmo. Ĝis nun ĉ. unu dudekono de la urbo estas malkovrita. Profesoro Fitz, dekomece gvidanto de la elfosado, opinias – inter alie pro la 50 000 personoj da kapacito de la amfiteatro –, ke eble tiu urbo havis en certaj periodoj la plej grandan loĝantaron en Panonio. Oni trovis tie grandegan palacon el kiu eble devenas la fama Seuso-trezoro kaj scias el aerfotografioj, ke ĝi stemiĝis sur ambaŭ bordoj de la proksima rivereto. Certe Gorsium estis ne nur la panonia centro de la imperiestra kulto, ne nur tie kunsidis la provinca asembleo, sed ĝi estis ankaŭ haveno de la tiam navigebla rivereto Sárviz [ŝarviz].



Gorsium: jam unu dudekono malkovrita.

OH



Sub la pino kuŝas plej bongusta manĝo-sablo.

Poemoj de Edwin Grobe

Ok sonetoj el Navaholando

1. La teksistino

En la mezo de la vasta altebenaĵo,
Ĉirkaŭate de kastel- kaj palacaspektaj
Monolitegoj de ŝtono, per longaj, rektaj,
rapidaj fingroj, pri sia bela artaĵo

Ŝi laboras, zorgante ke la desegnaĵo
Konceptita en ŝia menso, en perfektaj
Dimensioj kaj koloroj kaj kun korektaj
Ritaj simboloj, fariĝu ĝuste pentraĵo

Pri ŝia plej interna anima vizio
Vizio naskiĝinta en for-Siberio
Antaŭ multaj generacioj kaj portita

Trans-Beringe, tra-Jukone, laŭ-Rok-Montare
Ĉis Monument-Valo, kie en altspirita
Songado ŝi teksas nun kvazaŭ ĉealtare.

2. La savfadeno

Arlino Jazio teksas belan tapiŝon
Navahoan laŭ originala modelo
Hejmkonceptita. Iom similante fiŝon
En hipnotigas akvaria naĝpelmelo,

Ŝia menso, zigzagante de unu parto
Al alia de la malkutime kompleksa
Tuttapiŝa plano, timante ke la arto
Kiun ĝi elpensas ĝin retenu en teksta

Revo eterna kaj malpermesu ĝin sane
Reveni en ĉiutagan vivadon, saĝe
Naskigas savrimedon. Subaekstremaje

De la tapiŝo Arlino kudras, kaŝmane,
Sekretan ekstermodelan elirfadenon
Laŭ kiu la menso faru hejmenrevenon.

3. Festotago

Festotago en Navaholando. Alttago
De tutgenta kunveno. Tago de dancado,
Kantado, manĝado, rajdado, babilado.
Tago de kunĝojo, flortempo de kunago.

Avinjo Begajo, en sia konusforma
Ŝtip-kaj-kotdomo, vestiĝas por la evento,

Surmetante belajn turkisaĵojn kun sento
De preterkutima celo, de perternorma

Merito. Ĉielbluegaj estas la gemoj
De ŝia kukurbflor-kolĉeno. Bluaj estas
Tiuj de ŝiaj braceletoj, ŝiaj ringoj,

Ŝiaj harpingloj. Kontraŭ mensogoj, blasfemoj
Kaj misfaroj ŝi sentas sin ŝirmata, restas
Forta pro la dia bluo sub siaj fingroj.

4. Ŝvitdomo

En aparta konusforma ŝtip-kaj-kotdomo
Ruĝ-Nubo pretigas sanktan ŝvitbanon. Rondo
Da glataj riverŝtonoj atendas. Kun zorgo
Li estigas fajron meze de ili. Ĉoje

Li sin devestas kaj staras tie, nudkorpe,
Apud la flamoj. El proksima argilpoto
Li prenas manplenojn da akvo kaj ritmode
Ĵetas ilin laŭvice sur la varmajn ŝtonojn.

Suprenleviĝas pezaj cirkloj de vaporo.
Ruĝ-Nubo komencas ŝviti laŭ la plenlongo
Kaj plenalto de sia korpo. Preĝparole

Li petas ke la Ĉiopovanto pardonu
Al li liajn misagojn, cedu al li novajn
Ŝancojn reesti purkora, purkama homo.

5. Sablopentraĵo

Jam de semajnoj Ĉranda-Aglo estas malsana.
Alvenas Ĉrand-Urso kun spertego ŝamana
Por fari savan terbildon. Kun boninfana
Seriozo, pere de malnov-Novmondana

Scio, tiu purigas farspacon per mana
laborado kaj figurojn de spiritbana
Efiko komencas desegni, kun gentana
Fido, surgrunden mem, laŭ praa Indiana

Tradicio. Persable, perŝtone, pergrene,
Perpolve, perbere, permukse, perpolene
Li plenumas la pentraĵon, tiam sidigas

La malsanulon mezen de ĉio, devigas
Tiun resti surbilde dum longa preĝado
Ĉis finefektiviĝos la resanigado.

6. Muzikiloj

Per mia tamburo mi sonigas la bazan
Ritmon de la vivo, la senĉesan pulsadon
De la sangofluo, la konstantan spiradon
De la pulmoj, la altceremoni-okazan

Surgrundan stamfadon de dancantaj piedoj.
Per miaj klakiloj mi aŭdigas la sonojn
De la natura medio, la bekajn tonojn
De la pegoj, la susurojn de la florbedoj

En ventaj tagoj, la zumadon de insektoj
Kuniĝantaj ĉirkaŭ nektarfontoj, la kriojn
De lacertoj en urĝa sudherba kurado.

Sed per mia fluto, en pli dolĉa kantado,
Mi aŭdigas pli internegajn melodiojn
Pri koraj eventoj, pri animaj efektoj.

7. Ĉifroparolantoj

Dum Dua Mondmilito, en Sud-Pacifiko,
Nia lando havis komunikajn problemojn
Ĉar ĉiujn gravajn mesaĝojn la malamiko
Sukcesas kapti kaj deĉifri. Tiajn temojn

Mi kaj miaj samgentanoj, intersoldate,
Priparolis kaj kunkonceptis la proponon
Militmesaĝi Dine-lingve. Ĉirkaŭate
Tial de fremduloj malkonantaj la sonon

De nia Navahoa lingvo, ni eltrovis
Ĉifrolingvaĵon kiun tute malscipovis
Niaj kontraŭstarantoj. Kvindek jarojn poste,

Kiam ni jam maljuniĝis aŭ, eĉ pli koste,
Mortis, nur tiam la blankrasa registaro
Konsentis nin danki pro nia lingva faro.

8. La rulringdancanto

Tamburo sonas. Klakiloj aŭdiĝas. Fluto
Muzikadas. Nudbrusta, nudbraka, nudkrura
Dancanto venas, en ritma korpa konduto,
Kun man-, ŝultro- kaj piedgestado aŭgura,

Ĝirigas grandajn rulringojn en sammomenta
Irado ĉirkaŭkola kaj ĉirkaŭtalia,
Ĉirkaŭbraka kaj ĉirkaŭgamba, evidenta
Memdisciplino de alta ceremonia


Eĉ religia valoro. Je la kulmino
De la danco, la dancanto intertekstigas
La rulringojn por formi simbolan terglobon,

Tiel indikante Navahoan aprobon
Pri la altdia volaro kiu kunligas
Ĉiun kaj ĉion en daŭra cirkla senfino.

Abonhelpa Fonduso.

En 2000 la legantoj de
MONATO donacis 49
senpagajn abonojn al
Esperanto-parolantoj en
Albanio, Ĉado, Ĉinio,
Irano, Kostariko, Kubo,
Malio, Rumanio,
Vjetnamio kaj en aliaj
landoj. Sed restas
ankoraŭ multe pli kiuj
deziras legi revuon en
Esperanto sed ne havas
la finanĉan kapablon por
pagi ĝin.

Vi helpu al ili ricevi
MONATOn senpage
donacante sumon al la
„Abonhelpa Fonduso”.



Sendu kiun ajn sumon al FEL^o aŭ al via
kutima peranto, kun la mencio
„Abonhelpa Fonduso de MONATO”.

Se vi deziras, vi povas ankaŭ ekscii, kiu
ricevis la abonon kiun vi donacis kaj
eble ekkorespondi kun „via” leganto.
Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevantoj kaj ricevontoj
koran dankon!

La japana, bizara lingvo

En tiu ĉi rubriko aperas, inter aliaj, priskriboj de diversaj lingvoj. Iuj legantoj esprimis deziron ke oni verku skizon de la japana. Jen do: sed mi decidis ne ĝeni ilin per ekzemploj el la japana vortprovizo, kiu havas nenian utilon ol por la japanoj.

Objekto antaŭ verbo

Oni povas, malprecize, klasi la lingvojn sur tiu ĉi planedo en SVO-lingvojn kaj SOV-lingvojn: nome, tiuj kun la vortordo subjekto-verbo-objekto kaj subjekto-objekto-verbo. La plimulto de la eŭropaj estas SVO, kaj multaj, t.e. multaj eŭropanoj, pensas ke tiu estas pli normala, sed se oni nombras simple aritmetike, nome sen konsidero, ekzemple, al la nombro de la parolantoj, aŭ al la grado de la civiliziteco, rigardante la japanan parolatan de kolorhaŭtaj necivilizitoj kiel specimeno kun la valoro de unu paralele kun tia granda lingvo kiel la franca, aŭ eĉ la angla, tiam, lingvistoj diras, la SOV-lingvoj okupas 6 dekonojn de la tri mil aŭ ses mil (depende de la kalkulanieroj) lingvoj de la mondo. La unua karakterizo de la japana estu ĝia SOV-eco, kaj tio signifas ke la japana ne estas nenormala lingvo, sed statistike pli normala ol la eŭropaj lingvoj.

SOV kaj SVO tamen ne estas tre distingaj, se oni konsideras kelkajn idiomojn: unue, kiam oni instruas esperanton, la instruisto diras ke oni povas, danke al la akuzativo, aranĝi vortojn en esperanta frazo libere: hundo mordas homon aŭ homon mordas hundo. Esperanto do ne estas SVO nek

SOV, ĝi estas ambaŭ. Ĝuste kiel klasikaj lingvoj, t.e. eŭropaj klasikaj lingvoj, ĉar aziaj klasikoj estas nekonataj, mal-kiel la greka kaj la latina. Strange, en la germana, oni havas frazojn aŭ propozici-tipojn SVO kaj SOV. Ĉi-koncerne, iuj lingvistoj respondas ke la germana estas SOV-lingvo, kaj ke la germana VO-frazo kiel ĝi aperas, „sur la surfaco”, kiel diras lingvistoj de la tiel nomata genera-transforma gramatiko, estas transformo de la profunda strukturo SOV. Ĝi apartenas do parte al sovaĝula lingvogrupo kiel la japana. La SOV-aranĝo en subpropozicioj en la

'La fonetika propreco de la japana estas tre unika'

germana tamen ne estas, feliĉe, denaska, aŭ genetica, karakterizo; ĝi fariĝis regulo iom post iom dum la epoko de la mezalta germana, t.e. lingvo de la mezepoka suda Germanio, fariĝinta post Lutero-norma en la tuta lando, por esti fikse starigita nur en la novalta, t.e. la moderna norma germana. SOV-karakterizo sin trovas en la franca, la plej rafinita, kaj logika, sur la tero: pronoma komplemento de objekto metiĝas antaŭ la verbo: „hundo lin mordis”.

Kontraŭ tiuj civilizitaj lingvoj kun



ŝanceliĝoj, en la japana la verbo ĉiam, senescepte, venas post la objekto. La japana do estas lingvo SOV *par excellence*.

Komplemento

Ne sole la objekto: ekzistas aliaj komplementoj de la verbo, kiel ekzemple komplemento de objekto nereakta: la fama latina frazo „regina puellae rosam dat” (la reĝino al knabino rozon donas). Ne nur objektoj, sed aliaj komplementoj, ekzemple de cirkonstancoj, aŭ adjektoj, kiel „li rapide kuras”. En la japana ĉiuj komplementoj de la verbo staras antaŭe. Tio signifas ke japanaj frazoj finiĝas ĉiam per verbo. Tiam oni ne devas izoli la subjekton disde aliaj komplementoj, kaj

fakte ĝi povas troviĝi ie ajn en la frazo krom post la verbo, nome ĝi estas speco de komplemento. Tiamaniere, ni devas ŝanĝi, aŭ pliĝeneraligi la priskribon de la japana de SOV- al KompV-lingvo, kie Komp staras por Komplemento.

Postpozicio

Dua specialaĵo de la japana estas, ke ĝi uzas postpozicion, anstataŭ prepozicion kiel la kulturaj lingvoj. Japa-



noj diras „li al” anstataŭ „al li”. Tio ankaŭ ne estas monopolo de la japana, sed estas dividata de multegaj neeŭropaj lingvoj. Ni povas dividi la lingvojn en Pre-lingvojn kaj Pst-lingvojn, kie Pre estas mallongigo de prepozicio, kaj Pst, de postpozicio.

Sur tiu ĉi etapo de nia esploro, ni ekrimarkas ke SOV- kaj SVO-lingvoj koincidas kun Pst- respektive Pre-lingvoj. Oni eĉ povas diri SVO-Pre- kaj SOV-Pst-lingvoj. La japana do estas SOV-Pst-lingvo, aŭ KompV-Pst-lingvo, laŭ la ĵus enkondukita termino. Tiaj estas, el eŭropaj lingvoj, la hungara kaj la finna. La germana, kvankam SOV laŭ iuj lingvistoj, estas Pre, iom strange. Ĝi iuokaze havas alian frivolecon kun postpozicio: *meiner Meinung nach* „mia opinio laŭ”. En Azio, la korea, la mongola kaj la tjurkaj (vidu PIV) lingvoj estas SOV-Pst-lingvoj. La ĉina, kvankam lingvo de flavhaŭta popolo, estas SVO-lingvo.

Kap-finaleco

Ĉu tiuj du kvalifikoj, OV kaj Pst ne povas esti unuigita?, ĉar „ne estas multiplikendaj entoj preter neceseco” (*non sunt multiplicanda entia preter necessitatem*), kiel skribis la mezepoka angla teologo Vilhelmo de Okkam. Jes. Iuj lingvistoj analizas frazeron, aŭ sintagmon, en du komponantojn: kapo kaj komplemento.

Kapo Komplemento

1. Sintagmo verba (SV):
mordas homon
2. Sintagmo prepozicia (SPre):
per dentoj
3. Sintagmo adjektiva (SA):
fiera pri sia beleco
4. Sintagmo noma (SN):
hundo kiu mordas homon

Komplemento Kapo

1. Sintagmo verba (SV):
homon mordas
2. Sintagmo postpozicia (SPst):
dentoj per
3. Sintagmo adjektiva (SA):
sia beleco pri fiero
4. Sintagmo noma (SN):
homon mordas hundo

La supra diagramo montras ekzemplojn en Esperanto, se temas pri la japana en la suba diagramo.

Tial „tio estas la hundo, kiu mordis homon per dentoj” fariĝas en la japana „tio [₁[₂homon per dentoj mordis]₂a hundo]₂ estas” aŭ „tio [₁[₂per dentoj homon mordis]₂a hundo]₁ estas. La japana estas kap-finala lingvo, dum eŭropaj estas kap-inicialaj.

Kiel montras la supra diagramo, en eŭropaj lingvoj relativo ligas la epiteton al la substantivo. En la ĉina, tiun funkcion plenumas la partikulo, aŭ postpozicio, *de*. Tiam ligilon oni nomas Komplementigilo. En la formuloj de la supra alineo, ĝi estas montrata per la esperanta adjektiva finiĝo *-a*. En la japana ne troviĝas, en tia okazo, komplementigilo; tiu ne estas bezonata ĉar en la sinsekvo Verbo-Substantivo estas epiteto la verbo dum Substantivo-Verbo estas frazo kun la substantivo kiel la subjekto. La sintaksa regulo eliminis komplementigilon. Kurioze, la ĉina partikulo *de* signifas *de* esperantan inter du nomoj tiel ke „lia” estas en la ĉina „li de”, same kiel ĝi estas en la japana „li de” fidele al ĝia Pst-lingveco.

Kie venas la subjekto? – legantoj demandus. La frazo malvolviĝas unue en la specifilon kaj X (kiu povas esti sintagmo verba, prepozicia, adjektiva aŭ noma), kaj due X malvolviĝas en kapo kaj komplemento. La subjekto okupas la pozicion de specifilo. Formule, S -> [Spec X], X -> [Kapo Komplemento]. Ĉar, en la japana, la subjekto estas komplemento, la rimedo specifilo ne necesas.

Epitetoj

Dum la japana estas 100-procente kap-finala, aliaj lingvoj prezentas mik-

itajn karakterizojn. Ekzemple, en la franca, kap-iniciala, la vortordo de sintagmo noma estas principe substantivo-epiteto: „rozo ruĝa” anstataŭ „ruĝa rozo”, sed oni trovas ankaŭ „homo granda” kaj „granda homo” kun diferencaj sencoj. Tial la kap-inialeco de la franca ne estas absoluta. Preskaŭ en ĉiuj artikol-havaj lingvoj, plejparte eŭropaj lingvoj, inkluzive ankaŭ la hungaran, la artikolo sidas antaŭ substantivo, kio estas escepto de kap-inialeco. Nur kelkaj, ekzemple la sveda aŭ la rumana havas postsubstantivan artikolon. La franca esprimas *un bon vin blanc* „unu bona vino blanka” estas maso da hibrideco.

Preter la supre menciitaj, la kap-finaleco aŭ -inialeco rimarkigas sin en multaj facetoj de lingvoj.

En la pure kap-finalaj lingvoj (koncerne la sintagmon noman) en orienta Azio, la adreso estas skribata ekde la plej granda unuo ĝis la plej malgranda unuo, t.e. ekde la lando tra regiono kaj urbo kaj kvartalo (aŭ strato) ĝis domnumero. Tia estis la praktiko en orienta Eŭropo: Varsovio, str. Dzika N.º 9.

En okcidenta Eŭropo, la mala sistemo regas. La franca kaj la angla estas pure kap-finalaj. La itala estas duone tia: la domnumero venas post la strato, kio estas kap-iniciala. Okcidenta Germanio forĵetis la orientan manieron donante prioritaton al unuformeco kun la Eŭropa Unio prefere al la tradicio, kaj Orienta Germanio transiris al la okcidenta sistemo post la unuiĝo.

Oni ne povas juĝi, kiu estas preferinda; ĉiu havas sian logikon; sed de la vidpunkto de leterportanto, la kap-iniciala estus pli oportuna, ĉar li legas unue la supran linion de koverto kaj sekvas la adreson de la pli granda al la pli malgranda, de supre al malsupre.

Aglutineco

Mi ne parolis pri la aglutineco de la japana; tiu estas amata ĉevaleto de tiel nomataj esperantologoj, ne serioze rigardata de veraj lingvosciencistoj. Ĉiuj lingvoj havas pli aŭ malpli da aglutineco, kaj tiu ĉi ne povas servi kiel specifa diferenco, *differentia specifica*. Ĉiuj prepozicioj estas aglutine uzataj, do eŭropaj lingvoj estas aglutinaj lingvoj. La aglutineco koncernas nur morfologion de lingvo, nome formojn kiujn prenas vortoj, do rilatas nur al parto de atributoj de lingvo. Lingvoj distingas sin reciproke per sintakso, nome kiel oni aranĝas vortojn en frazo.

Fonetiko

Pli ol pri la fama aglutineco, mi vo-



lus paroli pri fonetika propreco de la japana, kiu estas tre unika.

1. La japana uzas pli malmultajn sonojn ol plimultaj lingvoj, pli multajn ol malmulte da lingvoj, kiel la havaja.
2. Ĝiaj silaboj estas preskaŭ ĉiam malfermitaj, t.e. ili finiĝas per vokaloj.
3. La konsonantoj estas preskaŭ ĉiam sekvataj per vokaloj. Tion komplikas la fakto ke vokaloj ofte senvoĉiĝas: „esperanto” estas „esuperanto” laŭ la japan-fonologia principo, sed „u” post „s” senvoĉiĝas kaj plie komplete forfalas tiel ke oni praktike prononcas ĝin „esperanto”, sed oni skribas kun „u”.
4. Ekzistas duoblaj konsonantoj, kiel en la itala, kaj la distingo de longaj kaj mallongaj vokaloj, kiel en la germana. La fremdlingvanojn volantajn lerni la japanan elparolon plej penigas tiuj du specialaĵoj, krom por tiuj kies denaska lingvo estas unu el la supre menciitaj. En la ortografio, longa vokalo estas signita per la supre metita cirkumflekso, aŭ esperanta ĉapelo, kaj malofte per la makrono, mallonga streketo, la signo de longa vokalo kiun oni uzas en elementa kurso de la helena kaj la latina, kaj kiun oni ortografie uzas en, ekzemple, la litova. En la plej-

parto de la mondo ili estas malhavataj laŭ modelo trudita de la lingva imperiismo de la angla („Super-signoj, pro kiu diabla kaŭzo?”).

5. La akcento estas tre unika. Unue, ĝi konsistas en alteco, aŭ frekvenco de la son-ondo, kiel en la helena kaj latina, kaj en la sveda. Tio ne estas tre tre unika, sed ĝi konsistas en altigo de unu aŭ kelkaj vokaloj en sinsekvaj silaboj, kio estas unika, la sola en la mondo, kiom mi scias.

Skribmaniero

La plimulto de la fremdlingvanoj pensas ke en Japanio oni uzas ĉinajn ideogramojn, kaj pli kleraj scias ke oni uzas kanaojn (vidu PIV) kune kun la ĉinaj literoj. Tio estas prava, sed la latina alfabeto povas perfekte transskribi la lingvon, kaj la latinigistoj, kiuj movadas por plivastigo de latinliteraj literaturoj, afiŝas la devizon ke la latinaj literoj estas la dua norma skribmaniero de la japana paralele kun la kana-ĉinlitera skribado. Latinaj literoj estas instruataj en bazaj lernejoj, kaj internaciaj mallongigoj, kiel kg, cm, kW ktp estas universale uzataj kaj komprenataj, solaj aŭ en kana-ĉina teksto.

YAMASAKI Seikō

Romano el la flandra literaturo

En ĉi tiu malgranda sed poezieca kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretigas ĝin en konata historia periodo, tiu de la Nazaretano. Tiel, li reduktas siajn spertojn al simbola rakonto, transportante vivon kaj strebadon de individuo al nivelo universala. Li donas al sia rakonto filozofian substraton kaj en tiu maniero levas ĝin al tuthomara realeco.

La migranta judo




Paĝoj: 72; ilustrita; 21 cm; vinktita;
Prezo: **8,00 €**

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

de PEJNO Simono



La profeta kurso

(Parto 2)

Dum la profeta kurso Petro kaj Danjelo plene rezignis pri plia programado. Unue la telefono senĉese sonoris. Due la posta diskuto pri la telefone spertitaj amuzajoj tiom ridigis la programistojn, ke simple ne plu eblis serioze okupiĝi pri io ajn. Aldone el la ĉambro, kie la profeta kurso okazis, ŝvebis alterne ĉantoj kaj kantoj. Se la himnoj iel paŭzis, aŭdiĝis ne plene kompreneblaj alvokoj kun postaj laŭtaj krioj de „Haleluja!“. Nur posttagmeze ĉio iomete pli trankviliĝis. Ne estis tiom da telefonaĵoj kaj en la profeta kurso oni estis laŭŝajne laciginta sin per la haleluja-ado. Supozeble jen posttagmeze Zandero malkaŝis siajn sekretojn. Kelkajn fojojn la du programistoj subaŭskultis la kurson rekte antaŭ la pordo de la ĉambro - orele ĉe porde. Sed tio, kion ili aŭdis, estis tiom konfuza, ke ĝi rezistis ĉiuspecan sanmensan priskribon. Poste ili inter la diversaj traktataj telefonaĵoj multe diskutis pri la frenezeco de la kursa enhavo.

Ĉiun vesperon Petro intervjuis la partoprenintan Karlon pri la lernitaĵoj. Tiu tamen ne konfidencis ion ajn. Evidente li estis ricevinta rigoran ordonon silenti pri ĉiuj okazaĵoj en la kurso - kaj tre specife silenti pri tiuj al la du programistoj. Same statis ĉe ĉiuj aliaj kursanoj. Nur unu afero klariĝis. La kulmino de la kurso okazu la lastan tagon, vendredon.

Tiu silento estis iomete escepta situacio. Normalokaze la komputilestro multe diskutis kun Petro kaj Danjelo. Ekzemple pri Darwinismo. Aŭ pri la laŭvorteco de la bibliaj historioj. Entute pri kredo kaj nekredo. Iam kaj iam Karlo grumblis pri la plej novaj kapricoj de sia ĉefo, Frederiko. Ekzemple, ke li volis gajni proceson kontraŭ la urba konstrupermesa oficejo per preĝado, kvankam lia advokato konsilis al li tuj klopodi pri eksterprocesa interkonsento. Aŭ pri tio, ke Frederiko neniam ajn sciigu, ke specifa programeto en la Uniksa operaciumo de la nova komputilo nomiĝas „demon“. Se Frederiko vere iam malkovros pri tio, Karlo ĵuris, ke jen la fino de ĉiuspeca komputilado en la misiejo. Frato Frederiko ĵetos la tutan aparataron tra la fenestro sur la unu etaĝon pli malaltan korton. Poste li tute persone forpelos ĉiujn pliajn demonojn el la komputila centrejo - inklude Petron kaj Danjelon.

Fakte la forpelado de diabloj estis la ne plu tute sekreta hobia de la misiestro Frederiko kaj li entuziasme kolektis ĉiuspecajn raportojn pri tiaĵoj. Aldone li

korrespondis kun du profesiaj malsorĉistoj kaj jam taksis sin spertulo pri elpelado de demonoj. Li avida atendis sian unuan kazon kun aŭtenta sorĉito. Pri tio plej bone sciis lia sekretema sekretariino Ingrida. Iam Petro demandis al ŝi, ĉu ŝi vere kredas, ke jen malantaŭ la granda kaŝtano sur la korto vespere kaŝiĝas malgranda diableto. Estis ja vintro kaj la noktoj estis sufiĉe malhelaj. Ŝi tuj ofendiĝis kaj kolere fiksrigardis lin. Ŝian fiksrigardon tre substrekis ŝiaj grandaj iomete buface ŝvelaj okuloj.

Sandra, la datumtjapistino, tre bela virino kun iomete slavaj trajtoj kaj longaj nigregaj haroj, ĉiam rave kaj tute ne misiistine vestita, fronte al la sama demando pli lerte elturniĝis. Ŝi deklamis, ke ŝi jam principe ne tiom okupiĝas pri diabloj. Ŝi kredas je la bono kaj je la malbono. Punkto. Sandra estis entute lerta. Jam dum jaroj ŝi sukcesis kaŝi sian lesbaninecon antaŭ aliaj misianoj. Nur la du programistoj estis rimarkintaj ŝian sekreton baze de pluraj epizodoj, interalie okaze de ŝiaj sopiraj rigardoj al iomete maskleca kelnerino dum granda festeno en restoracio je la kostoj de ilia programada firmao. Verdire Sandra estis iomete frivola kaj ĝuste pro sia samseksa inklino ŝi povis tute senĝene ŝerci kaj ŝajnamindumi kun viroj. Aldone ŝi ne tiom rapide ofendiĝis. Kontraste, Ingrida estis iomete tro serioza. Kaj la piega filino de la misiestro, Karolina, estis tute ne ŝerce alparolebla. Eble pro ŝia eksterordinara malbela. Kun Bodo, la transportestro, ne eblis ŝerci aŭ diskuti. Li estis simple tro stulta.

Ekde merkredo la du programistoj ne plu tiom interesiĝis pri la teretaĝa profeta kurso. Estis tro streĉe ĉiam subaŭskulti rekte antaŭ la pordo kaj ĉe tiu impertinentaĵo eĉ riski malkovron. Aparte de tio la senĉesa haleluja-ado jam komencis tedi. Nur pri la kulmino de la tuto ili plu iomete sciemis. Onidire estos iuj pruvoj pri la vero de la tuta afero. Sed ĉu iu konfidencos pri tiu ĉi zelota zenito al ili? Danjelo opiniis, ke certe ne, ĉar de ĉiuj kursanoj la lipoj restis ĝis tiam plene sigelitaj. Same ne sukcesis iel involvi Zanderon mem en iujn interesajn debatojn dum la kursaj paŭzoj.

Vendrede ĉio ŝanĝiĝis. Matenkomenca la jam kutimaj sonoj de fervora komuna preĝado, instigaj

► instruistaj alvokoj kaj komunumaj haleluja-krioj ŝvebis tra la aero de la ŝtuparo kaj koridoroj al la relative fora komputila centrejo. Tiun vendredon la telefonoj nekutime malviglis. Ne estis multe por fari rilate la ĝeneralan movtenon de la misiaj eksteraj aferoj. Pro tio Danjelo, la iomete pli juna el la programistoj, sidis sur la fenestrotabulo kun arkigitaj kruroj kaj, tedite, gapis al la malsupra malplena neĝkovrita korto. Jen la parkumejo de la misiejo. Kiel ĉiam staris kortrande deko da aŭtoj. Ĝuste en tiu ĉi momento alvenis nova aŭto. Sed ĝi ne apartenis al iu konato. Post jaro da ĉeesto en la misiejo, Danjelo fakte rekonis ĉiujn aŭtojn de ĉiuj kunlaborantoj, liverantoj kaj oftaj gastoj. Sed jen tute nova nekonata aŭto, flavete blanka „Opel Ascona”. Iel Danjelo konvinkiĝis, ke temas pri luita aŭto - sen precize scii la bazon de sia suspekto. Ambaŭ programistoj ofte devis post interurba flugo lui aŭton ĉeloke por atingi vokintan klienton. Eble pro tio Danjelo iel aŭtomate ekkonis ĝian luitecon, kvankam iu emblemo pri la lufirmao ne estis malkovrebla de supre tra la komputileja fenestro. Ĉiuokaze, el luaŭtoj kutime elaŭtiĝas sur firmaa parkumejo - la misiejo estis laŭ lia takso speco de firmao, kvankam jure temis pri neprofitcela organizaĵo - specifa speco de persono - preskaŭ ĉiam bone vestita kaj entute finance bonstata. Tipe jen teĥnikisto, programisto, aŭ vendisto pri iu kosta oficeja teĥnikaĵo. Aŭ eble ekonomia konsilisto aŭ kontrolisto.

El tiu aŭto elaŭtiĝis tamen tre magra dudekjaraĝulo en tre eluzite aspektantaj vestoj. Malgraŭ la ekstera malvarmo al li mankis mantelo. Li portis nur grizan someran jakon kaj ĝinzon. La nekonato aspektis entute iel bedaŭrinda. Li ŝlosis la aŭton, rigardis al sia brakhorloĝo kaj senhaste transiris la korton ĝis la angulo de la konstruaĵo rekte sub la fenestro. Tie li ekstaris, serĉis iomete en sia jaka poŝo, enbuŝigis cigaredon kaj ekbruligis ĝin. Tiun li ĝue fumis, starante rekte ĉe la murangulo. Danjelo iomete ŝanĝis sian sidpozicion sur la fenestrotabulo por pli bone studi lin. Jen strangulo. Veste li aspektis ege malriĉe, sed poze, ire kaj aŭte li impresis iel eleganta. Regis nedifinebla tensio inter liaj vestoj kaj lia cetero.

La stranga vizitanto rerigardis sian horloĝon, fingrolerte pafis la nur duone fumitan cigaredon teren kaj piedplatigis ĝin sur la unua ŝtupo de ŝtuparo, kiu kondukis plu ĉirkaŭ la angulon de la konstruaĵo al la precipa enirejo. Tiam li alprenis tute novan korpan teniĝon - fakte malteniĝon. Nome tiun de paralizulo, kiu apenaŭ plu kapablas marŝi. Vere kompatindege lamante, li trenis sian apenaŭ plu funkciantan korpon la ŝtuparon supren kaj per evidente senhoma volego sukcesis malrapide kaj tre ŝanceliĝe pluiri ĉirkaŭ la angulon.

Danjelo ekkriis pro surprizo. Vigle gestante al sia kolego, li rapidis al la alia fenestro por rigardi la daŭrigon de la spektaklo. La lamegulo nun ĵus atingis duan ŝtuparon rekte antaŭ la precipa enirejo. Ambaŭ programistoj kun granda ekintereso rigardis, kiel tiu ĉi sortbatita lamegulo kuraĝe okupiĝis pri tio, kiel li iel venku la ok ŝtupojn rekte antaŭ la pordo, spite al siaj apenaŭ stireblaj korpomembroj kaj tremegantaj manoj fine de plene torditaj brakoj. Petro decidis, ke la vizitanto devis disponi pri ostoj el kaŭĉuko por tiom tordi sin.

Ĉiuokaze, la povrulo nun perfekte elmontris, kiel malfacile estas premi la butonon de la elektra pordsonorilo, se oni havas korpon tiom ruinigita de kruela malsano aŭ tragedia misnasko. Fine, post la sesa kuraĝa klopodo, li tamen sukcesis premi la butonon. Sonoris.

Petro kaj Danjelo kuris el la ĉambro por kaŝe rigardi malsupren tra la ŝtuparejo, kiu spiralis ĉirkaŭ meza malplena spaco. Ili vidis, kiel la aliokaze tiom sobra

Ingrida venis el la kursĉambro kaj tute ekscitite bonvenigis la torditon per la vortoj -

„Ho, Dio mem sendas vin al ni. Danku al Dio! Danku al Dio! Ho, Sinjoro!” Ne estis tute klare, ĉu la „sinjoro” estis la ĉeesta tordito aŭ la malĉeesta Ĉiela Patro.

La lamegulo tamen ne respondis. Li nur gruntis. Evidentiĝis, ke parto de lia simptomaro estis ankaŭ la malkapablo pri normala homa komunikado. Li apenaŭ povis paroli. Kun granda peno li lamis de la enirejo tra la koridoro ĝis la pordo de la kursa ĉambro. Ĉe tio Ingrida klopodis laŭpove apogi lin, fakte cirkle kaj de ĉiam novaj minacantaj faldirektoj. Ŝi jam ploris pro kompatato pri la terura stato de la juna viro. Ambaŭ malaperis en la kursan ĉambron kaj la pordo denove fermiĝis.

Petro kaj Danjelo kuregis suben ĝis la fermita pordo. Kio nun okazos, tio estis tuj al ili klara. Efektive, dum tuta horduono oni dankis al Dio, ke la superpova preĝado estis aŭdita. La tuta skipo evidente ĵus superpreĝis pri tio, ke iu povrulo hazarde venu al ĝi por mirakla kuracado. Kaj abrakadabre - jen kuracoto alvenis.

Laŭ la sperta kaj korŝira interpretado de Zandero - necesiĝinta ĉar la veninta bedaŭrindulo blekis tro mallaŭte, por tio, ke iu povos rekte kompreni liajn vortojn - temis pri vojaĝanto el fora Hamburgo, kiu hazarde nun volis viziti sian patrinon mortantan en malsanulejo en Frankfurto. Li ege timas sian viziton ĉe sia patrino, ĉar ĉiun fojon denove lia aspekto tiom malgajigis ŝin. Ĝuste mortlite la brava patrino tamen nepre ne aldone nur pro li malgaju. De ekstere oni aŭdis kiel ĉiuj kursaninoj komencis plori. Ĉiuokaze, vojaĝe laŭ la aŭtovojo la juna viro subite aŭdis misteran voĉon en sia kapo. Tiu postulis de li, ke li tuj forlasu la federan aŭtovojon A5 kaj veturu Marburgon. Laŭ Zandero jen la voĉo de Dio persone, kiu navigis lin rekte ĝis antaŭ la pordo de la misiejo. Danjelo konkludis, ke tiu Dia navigado estis ne malpli altkvalita ol la plej moderna fajnbira satelita sistemo, ĉar por atingi Marburgon de la A5 estis necese celcerte transveturi amason da aŭtovojaj kruciĝoj.

La du programistoj konsterniĝis antaŭ la fermita pordo. Kion fari? Eniri kaj senmaskigi tiun tutan fraŭdon? La parolado de Zandero ĉesis. Denove oni murmuris preĝojn. Poste la kursestro rekomencis paroli. Nun li volis demonstracii, ke la partoprenantaro per lia kurso vere kapablos pri mirakla mantuŝa sanigo - memkompreneble nur helpe de Dio. La du antaŭ la pordo aŭdis, kiel la laŭta basa voĉo de Frederiko eklanĉis tondran trifojan „Haleluja!” Ĉiuj aliaj kursanoj sekvis lian ekzemplon.

„Mi petas ĉiujn el vi stariĝi laŭ cirklo ĉirkaŭ tiu ĉi tablo,” kriis la trompa Zandero.

Seĝoj ŝoviĝis. Evidente la paciento nun kuŝis sur la pretigita tablo.

„Mi vere ne scias, kion fari”, flustris Petro al Danjelo. „Se ni eniros, tiu Zandero eble eĉ kapablos influi siajn kursanojn mortbati nin. Ili kredegas ja ĉion, kion li diras. Ŝajne ili estas jam sub iuspeca hipnoto aŭ amashisterio.”

Tra la pordo aŭdiĝas zuma ĉantado. La du decidis retiriĝi en la normalecon de la komputilejo. Dek minutojn pli poste eksonis krioj kaj frenezaj aplaŭdoj de sube. Evidente la plena resanigo de la tordito estis sukcesinta. Al la ĝenerala jubilado aldoniĝis nova juna tre forta voĉo. Tiu de la mirakle sanigita vizitanto. Tiu nun kriis, ke ĝis nun li neniam estis kredinta pri Dio, sed ekde tuj li nepre volas iĝi Kristano. Do jen eĉ plia sukceso - freŝa konvertito! Iom pli poste la sanigito tute sole forlasis la kurson. Kompreneble pro sia nova sana stato li kapablis sen iuj apogoj glate atingi sian luaŭton. Li funkciigis la motoron kaj rapide forveturis.

Post plia horo da jubilado kaj dankpreĝado la profeta kurso triumfe finiĝis. ►

„Nu, Karlo, ĉu la kurso estas finiĝinta?” afable demandis Petro.

„Ho jes. Jen grandega sukceso kaj mi spirite gajnis multe el ĝi. Sed mi ne rajtas detale paroli pri ĝi. Kia domaĝo, ke vi ne apartenas al ni kaj ne same elkore kredas.”

„Ĉu mi ne aŭdis iun vizitanton veni mallonge post tagmezo?”

„Jes, efektive. Sed jen nenio grava.”

Petro silentis. Danjelo subpremimis nuancon de rideto. Poste en sia hotela ĉambro ambaŭ programistoj preskaŭ la tutan nokton diskutis, kiel oni agu fronte al tiu afero. Ne estis eble trovi vere adekvatan elirejon. Kiu volas kredi, simple kredos. Ne helpas io ajn. Aparte de tio, kiel oni pruvu, ke la jam malaperinta sanigito, kies adreson supozeble neniu notis, neniam reale malsanis?

Tri monatojn pri poste la komputilestro Karlo tre subite gravege malsaniĝis. Pro la ĥemia terapio kontraŭ lia tiama leŭkemio la vandoj de liaj intestoj estis poreciĝintaj. Nun ili komencis simple disfali. La ĥirurgoj de la Marburga malsanulejo ne povis iel helpi, same ne iliaj kolegoj en la plej proksima universitata kliniko specialigita pri gastroenterologio. La tuta intestaro de Karlo estis ne plu iel kunkudrebla aŭ alie fiksebla. Unu intesto post alia simple krevis. Pro tio oni jam artefarite nutris lin per tratubigata solvaĵo. Ankaŭ aliaj organoj komencis disfali kaj aldone ekestis novaj kanceraĵoj iel sekve de lia leŭkemio.

Petro kaj Danjelo vizitis Karlon. Lia tuta aspekto post kvin sensukcesaj rapidsekvaj operacioj estis

horora. Aldone la fakto, ke la ĥirurgoj lasis lian ventran haŭton nefermita, jam preta por la morgaŭa sesa senespera operacio - Karlo montris tion al ili - tiom ŝokis Petron, ke li devis fuĝi tra la ĉefenestra vitra pordo sur la apudan eksteran balkonon por vomi. Lia psiĥo ne plu kapablis regi sian korpon. La tuta aro da tuboj inter la vivtenaj aparatoj kaj diversaj lokoj kaj eksteraj organoj de la korpo de Karlo nevenkeble naŭzis lin. Daŭris dek minutojn ĝis li sufiĉe refortiĝis por reeniri la ĉambron.

Karlo rakontis, ke post horduono la tuta skipo de la misiejo vizitos lin kaj laŭ la Zandera rito sanigi lin. Li mem tamen laŭŝajne ne plu estis tiom certa pri ties sukceso. Aliflanke sen rekte diri tion, li evidente deziris, ke Petro kaj Danjelo reforiru por ne ĝeni la ceremonion. Plu li rakontis, ke la personaro de la malsanulejo jam estis permesinta okazigi tiun klopodon savi lian vivon. Evidente la kuracistoj estis rezignintaj kaj tial ne oponis tion. Ŝajne ili opiniis, ke ankaŭ eĉ la plej harstarigaj mistifikoj neniel ajn povos plimalbonigi lian staton. Do la du programistoj tiam decidis pro plene nova motivo plu prisilenti la fraŭdecon de la profeta kurso. Tre konsciante paroli kun mortanto, ili deziris al li baldaŭan resaniĝon.

Poste ekstere sur la parkumejo ili komune malbenis tiun krimulon Zandero, kiu tiom senhonte eluzis la naivon de tiuj ĉi vere infanecaj infanoj de Jesuo. Ili konsentis ankaŭ pri tio, ke ĉe la misiestro statis alie - li estis ne infaneca, sed iel dupersoneca - estante ja duone ege malnaiva kaj trompa kaj duone naivega kaj honesta. Forveturigante, Danjelo vidis en la retrospegulo, ke pluraj aŭtoj de la misiejo ĵus turniĝis de la strato en la enirejon de la malsanuleja parkumejo.

Tri tagojn pli poste Karlo estis morta. ■

(Fino)

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo.

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:


Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: retbutiko@fel.esperanto.be

Prezo 9 EUR (plus afranko).

Se vi mendos 3 ekzemplerojn, vi ricevos kvaran senpage!

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



BULGARIO

Rava poezia mondo

La bulgara pentristo-grafikisto Nikola Mitov (Kumaricata) naskiĝis en 1939 en la kvartalo Kumarica de la urbo Novi Iskar, apud Sofio. Li studis en pentroartaj gimnazio kaj akademio. Liaj instruistoj estis la grafikistoj Evtim Tomov kaj Veselin Stajkov.

De tridek jaroj la grafikaĵoj de Nikola Mitov eniras kolektojn de pentroartaj galerioj en diversaj urboj de Bulgario kaj en pluraj eŭropaj landoj. Multaj ŝatantoj de grafika arto el diversaj landoj posedas liajn grafikaĵojn.

La riĉa multjarcenta bulgara kulturo profunde inspiras la pentriston Mitov. Unu el la ĉefaj temoj de lia kreado estas la pitoreskaj bulgaraj monaĥejoj. En siaj verkoj Mitov strebas penetri en la romantikan atmosferon de la multjarcenta bulgara historio. La naciaj monaĥejoj, kiujn pentras Mitov, estas elokventaj simboloj de la bulgara kulturo. En la pasinta tempo, la monaĥejoj estis luliloj de la klereco kaj nacia spirito. La monaĥejoj gar-



Memportreto.


dis ne nur la lingvon kaj la literaturon, sed ankaŭ la riĉajn popolajn tradiciojn.

Mitov estas talenta majstro de pejzaĝo. En liaj grafikaĵoj videblas la vasteco de la dobruĝa ebenaĵo, la silento de etaj vilaĝaj stratoj, la beleco de malnovaj bulgaraj domoj kaj kortoj. La grafikisto ŝatas bildigi stratojn, parkojn, placojn de Sofio. En liaj pentraĵoj sentebblas la amo de la pentristo al la malnova bulgara ĉefurbo. Per siaj verkoj li instigas nin pli de-

tale rigardi la stratojn, laŭ kiuj ni iras, la konstruaĵojn, kiujn ni preterpaŝas, kaj ĉi tiel ni rimarku la belecon kaj ĉarmon, kiuj estas ĉirkaŭ ni.

Mitov estas eksterordinara pentristo. Li pentras portretojn de famaj historiaj bulgaraj personoj. En la portretoj li sukcesas esprimi ne nur la karakteron de ĉi tiuj personoj, sed ankaŭ montri la flamon en iliaj okuloj, la decidemon en iliaj vizaĝaj trajtoj. Nikola Mitov estas unu el la plej talentaj majstroj de la nuntempa bulgara grafikarto, en kies verkoj estas varmece kaj emocio.

Georgi MIHALKOV



Trojana monaĥejo (litografio).

KINO

Filmfestivalo en la patrujo de kino

En La Ciotat [la sĵotát] (Francio), oriente de Marsejlo, fratoj Lumière [lumjér = lumo], filmis en 1895 alvenon de trajno en la urban stacidomon, naskante la novan arton.

Por gardi la rilatojn kun la kinoarto, jam la kvaran fojon okazis tie festivalo de kinoscenaristoj. Dum kvar tagoj (de la 4a ĝis la 7a de aprilo) kunvenis profesiuloj, kiuj publike parolis pri verkproceso, funkciis diversaj praktikaj atelieroj, fakuloj gvidis kursojn pri verkado de kinoscenaroj. La publiko estis invitita ĉeesti kaj spekti diversajn filmojn, kies scenarojn verkis iu el la ĉeestantaj verkistoj, al kiu eblis fari demandojn. La profesiuloj multe diskutis inter si pri la premo de la usona kinoindustrio, kiu devigas ilin traduki siajn tekstojn en la anglan, por prezenti ĝin al eksterlandaj financistoj, eĉ se tiuj estas eŭropaj.

Ĉi-jare estis arte aranĝitaj „skriboĉambroj” por inviti la publikon verki. Okazis ankaŭ konkursoj „maratona” (necesis verki senhalte dum 24 horoj) aŭ „surpriza” (matene skribi historion, legotan vespere).

La ĉefinvitito, aktorino kaj kinoscenaristino Agnès Jaoui [anjés ĵaŭi], multe komentis sian novan filmon „Plaĉas al aliaj” („Le goût des autres”), kiu estis elektita por la usona kinokonkurso „Oscar”. Laŭ ŝi, eĉ



Agnès Jaoui

profesiuloj ne estis spektintaj ĝin, same kiel ili ne spektis la neusonajn filmojn, kaj la gazetaro tute ne interesiĝis pri la „eksteraj” produktaĵoj.

Ĉiuj menciis la francan politikon, kiu per diversaj leĝoj defendas kreadon en la franca lingvo, esperante, ke aliaj eŭropaj landoj tion sekvos.

Renée TRIOLLE

Post dudek tri jaroj


Pasis dudek tri jaroj post la apero de la unua (kaj ĝis nun ununura) poemaro de Mauro [maŭro] Nervi, *La turoj de l' ĉefurbo*. En 1978 la antaŭparolo de Aldo de' Giorgi al tiu volumeto estis ekstreme laŭda: li parolis pri „monstre kalejdoskopa verkisto”, „kiu posedas ĉiujn rekvizitojn por elstari plej brile”, „jam plene majoritata literatoro”.

Mauro Nervi komencis poeti deksep-jara, kaj lia unua verko aperis jam nur du jarojn poste. Enestis ne nur dudek du poemoj, sed ankaŭ kvin kanzonoj, kvar noveloj, du teatraĵoj, kaj tre matura eseo, pretekste kiel komento al unu el ĉi-las-taj, sed fakte eseo pri moderna poezio kaj esperanta teatro. La tuj postan jaron aperis *Blinda ermito*, poemaro tradukita el la itala (aŭtoro: M. Caprile).

Post tiel brila starto oni rajtus atendi rapidan torenton de pluaj verkoj. Male la poezia inspirado de Nervi evoluis tre malrapide: nur kelkaj poemoj en la postaj jaroj, aperintaj en *Fonto* kaj en *Esperanto*, enprenitaj en la dua eldono de *Esperanta Antologio*, gajnintaj diversajn premiojn en la Belartaj Konkursoj, kaj plena sepjara silento inter 1989 kaj 1996.

Tiu silento ne ŝuldiĝas al dormo de la muzo. Dum tiu periodo Nervi doktoriĝis pri medicino en Pisa, specialiĝis pri kirurgio kaj eklaboris ĉe la tiea universitato. Post tio li doktoriĝis pri germana literaturo en 1994, kaj en 1999 li akiris trian doktorecon pri klasikaj literaturoj. Lia verkado dum tiu periodo estis pri germanaj aŭtoroj, kaj en 1996 aperis lia traduko de *La Metamorfozo* de Kafka (indas citi, ke ne ĉiuj recenzoj estis tute favoraj). Tre buntas do lia paletro, kun germana kaj klasika fono, sur kiu engreftiĝis liaj novaj poemoj.

La nuna kolekto, *Havenoj*, estas pli magra ol la unua, fakte iom pli ol duona. Du trionoj el tiuj poemoj aperis jam en gazetoj. Paŭzomarko, inter la tridek unu poemoj aperas du prozaj interludoj, kvazaŭ aŭtobiografiaj. La temoj ne diversas kompare kun la unua poemaro: ankoraŭfoje oni renkontas la maron, la bordon, la strandon, la humidan sablon; ankoraŭfoje aperas la malbelaj signoj de la civilizo kun uzinoj kaj gruoj, siloj, pulioj, levmaŝinoj; ankoraŭfoje la



sensacoj donataj de narkoto.

Kio nova kompare kun la antaŭa verko? La homo estas la ŝipo kaj la vivo estas la haveno. Al la doloroj de la vivo Nervi respondas ĉefe per rezignacio, sed ankaŭ per ribelo. Certagrade la fluo de la junaĝaj versoj estis pli glata, la vortkunmetoj estis malpli enhavodensaj, tiel ke la poemoj estis pli faci-

le ĝueblaj; la versoj de *Havenoj* forte sentigas la kaloĉajan influon, kun la perfekteco de la ritmo, sed ankaŭ la impeta akcentado, kiu rapide kondukas al la versofino. Ankaŭ Auld estas forte sentebla en la koncizo, en la grandiozaj, tutvivaj temoj. Sed inspiron kaj vers-teknikon li ĉerpas ankaŭ el hispana poe-

zio. La antaŭparolo, de Miguel Fernandez, tiel priskizas la verkon: „La versoj en *Havenoj*, kvazaŭ kanteroj de senfina baroka voĉkanono, evoluas spirale ĉirkaŭ la akso de la vivangoro. ... Voĉo de homo ade serĉanta la radikon kaj la fonton, la profundan veron de sia ekzistada destino.” Sed kvankam la antaŭparolo pli lokas Nervi kiel inspiritan de la norda poezio, ne mankas inspiriĝo el García Lorca kaj el Andaluzio.

Nervi mastras kaj la mallongan version kaj la longan, kaj la malmultversan poeziaĵon kaj la pli longan, de la naŭversa *Odiseo* ĝis la sespaĝa *Suito por baroka fluto*. Kaj li bone fartas kaj kun la fiksaskemaj rimoj kaj kun la blankversa ritmo. Poeto kompleta, pesimisma, kaptanta, tamen, etajn erojn por esperi: sume, granda poeto.

Carlo MINNAJA

Mauro Nervi: *Havenoj*. Serio: Kargo. Eld. Bambu, Varna, 2001. 72 paĝoj. ISBN 954-9637-07-7. Prezo ĉe FEL: 6,90 eŭroj + afranko

Eto? Ego!

Min ridetigas kelkaj modestaj librotitoloj el Japanio. Jen, ekzemple, *Historieto de Esperanto* de Ludovikito. Ĝi okupas ne dudek sed 467 paĝojn sur luksa, peza papero. Kaj priskribas nur la periodon de la jaroj 1887-1903 (do devas havi daŭrigon). Ĉar ĝi estas la plej objektiva kaj dokumentita libro pri tiu temo, neniu povas esti konsiderata konanto de la historio de Esperanto sen lego de tiu libro. Tia historieto.

Kaj jen en miaj manoj estas alia „eto”: *Vortareto de kombineblaj vortoj* de Matubara Hatiro sur 606 grandformataj paĝoj, kiuj priskribas vortojn nur de A ĝis K (do ankaŭ devas havi daŭrigon). Tiu vortarego estas destinita por japanoj. Sed ĝi utilis ne malpli por ĉiuj neeŭrop-lingvanoj. Eĉ pli – ĝi utilis por ĉiu, eĉ la plej sperta Esperanto-lingvano. Malgraŭ sia eklektikeco kaj neprofesieco. Danke al sia riĉa kolekto de ĉio imagebla en ĉiu artikolo. Danke al strebo doni plej praktikan gvidilon en la maro de vortoj.

Esperanto havas fortan eŭropecan fonon. Kaj tio estas neevitebla. Do estas imageble, ke japanoj (kaj aliaj neeŭropanoj) frontas neatenditajn malfacilaĵojn. Kelkajn el ili indikas la aŭto-

ro de tiu vortaro. Ekzemple, evidentigas, ke „naĝi surdorse” por japano signifas naĝi kun dorso ... supren. Japano ne diras en sia lingvo „la luno (mal)kreskas”. Kaj kiel paroli pri la lipoj, se mankas morfologia montrilo de pluralo! Kaj kio pri sencodiferenco inter la similaj vortoj „facilanima” kaj „facilkora”? Kaj tiel plu, senfine.

Ĉion ĉi, kaj ne nur, portas al sia leganto la aŭtoro. Tipa artikolo enhavas derivitajn kaj kunmetitajn vortojn; determinantojn (adjektivojn kaj ne nur); vortkunojn kun verboj, substantivoj kaj (grave!) prepozicioj; multegajn ekzemplajn frazojn kun diversaj kuntekstoj; proverbojn. Da ĉio en abundo. Plus iom da tradukoj en la japanan, kiuj tute ne devas ĝeni alilingvanojn. Plus neoftajn klarigojn en la japana, kiujn mi, ho ve, gapas senkomprene.

Mi ĉiam admiras verkojn de aziaj esperantistoj, se ili estas altnivelaj. Kaj mi perceptas ilin kiel heroaĵojn. Se tiu ĉi vortar(et, eg)o kontribuos al la plimultiĝo de tiaj heroaĵoj, ĝi plenumos sian mision.

Boris KOLKER

Matubara Hatiro: *Vortareto de kombineblaj vortoj*. Parto A-K. Eld. Osaka Esperanto-societo, Osaka, 2000. 606 paĝoj glue binditaj. Prezo ĉe FEL ankoraŭ nekonata.

Abonantoj en Francio

Flandra Esperanto-Ligo regule ricevas ĉekojn el Francio de homoj kiuj volas pagi fakturon aŭ abonon al MONATO. Tiuj ĉekoj (palblukoloraj) portas belan eŭro-simbolon. En etaj literoj tamen ankaŭ troviĝas la mencio "payable en France". Malgraŭ malaperintaj landlimoj kaj komuna valuto tiujn ĉekojn FEL (en Belgio) ne povas enkasigi sen pagi altajn bankkostojn. Ni urĝe petas niajn francajn klientojn ne sendi tiajn ĉekojn sed uzi alian pagvojon. Ili povas ekzemple ĝiri la monon al la poŝtĉekoficejo de Bruselo por konto 000-0265336-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Belgio aŭ sendi internacian poŝtmandaton. Ankaŭ pagi pere de UEA-konto fela-x eblas.

Ni kore dankas al niaj francaj klientoj pro ilia komprenemo.

Gerd Jacques (librotenistino)

ESPERANTO

La nova latino de la eklezio

IN PRINCIPIO
Erit la kromenco
CREAVIT DEUS
Dio kreis
CAELUM ET TERRAM
la ĉielon kaj la teron

FEL

Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la kompreniĝo inter kristanoj el la tuta mondo. Tiu ĉi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta

Esperanto-movado. Kaj ĝi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantaĝoj kristanaj esperantistoj ĉiam denove konsciiĝas.

Paĝoj: 142; 21 cm; kudre bindita;
Prezo: 7,95 €

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
http://retbutiko.esperanto.be

Furoro de 


Ĉu Eŭropa Unio havas estontecon?

Zlatko Tišljar, fama instruisto de Esperanto, organizanto de la movado, ktp, ktp, verkis malgrandan, sed tre profundan eseon pri problemoj de Eŭropa Unio. Ĝi estas grava pro tio, ke li rigardas la problemojn deekstere (liaj propraj landoj Kroatio kaj Slovenio dume al EU ne apartenas), tamen spertoj (kaj negativaj, kaj pozitivaj) de iuj landoj, ankoraŭ troviĝantaj ekster tiu superŝtato, estas nepre konsiderendaj de ties ideologoj kaj gvidantoj.

Mi legis la libron, tuj post kiam mi aŭskultis en Moskva Domo de Sciencistoj prelegon de prof. Helmar Frank, prezidanto de AIS San Marino kaj eŭropuniano, pri proksima temo (eŭropunia lingva politiko). Kaj estas interese, ke ĝeneralaj ideoj de Tišljar kaj Frank rilate la estontecon de Eŭropa Unio kaj ideologion necesan por tio estas tre proksimaj (kvankam, certe, ne identaj). Do, la libro kaj la prelego kompletigis unu la alian. Al mi, kiel eksa civitano de Sovet-Unio (unio ne plu ekzistanta) – kiam mi rigardas la Union nun nur establiĝantan, tiuj ideoj estas tre kompreneblaj kaj proksimaj. Sekve, oni nepre ne preterpasu la solvon, kiu devas fari EU-on vivkapabla.

Kion do diras Zlatko Tišljar? Mallonge dirite, li asertas, ke 1) ĉiu unuigo de homoj devas havi certan propran ideologion kaj sinidentigilon; 2) la ĉefa bazo de la nuna eŭropa ideologio estas demokratio de diversecoj: „la senco de Eŭropa Unio estas montri al la homaro, ke ĉiu homo daŭre havas plurajn identecojn kaj apartenas samtempe al samaj grupoj” (p. 37); 3) samtempe bazo por komuna identeco de eŭropanoj kiel tiaj estas tro malforta, ĉar forestas por ili la baza homgrupa identigilo: komuna lingvo.

Kiel esperantisto, Tišljar certas, ke tia lingvo povas plej facile fariĝi ĝuste Esperanto. Se EU perdos la ŝancon fari Esperanton komuna eŭropa lingvo-identigilo, ĝi ne longe vivos, ĉar nur komunaj ekonomiaj interesoj ne estas sufiĉaj por teni kune tiom grandan kaj diversecan aron da popoloj. „La elitoj gvidas la socion,



kaj se iuj el la elitanoj ne estos kontentaj pro sia nekapablo uzi kontentige la ĉefan lingvon de sia nova superŝtato, ili daŭre influos al siaj popoloj produktante negativan etoson rilate EU-on kaj iom post iom kaŭzos la disfalon” (p. 65).

Do, esperantigo de EU devas fariĝi grava parto de la eŭropa ideologio. Ĉiu eŭropa esper-

antisto konsentos pri tio (eĉ tiu, kiu ne loĝas en EU-landoj, ĉar li ja revas, ke ankaŭ lia lando aliĝu ...). Do, Esperanto estas, verŝajne, la sola ŝanco por EU, kaj ankaŭ EU estas ŝanco por Esperanto. Sed estas nur unu dubo: ĉu la internacia lingvo, fariĝinte ies ŝtata lingvo (eĉ se de la superŝtato), ne perdos sian tutmondan rolon? Ĉu ĝi ne perdos allogecon por ekstereŭropanoj? Jes ja, por eŭropanoj ĝi restos neŭtrala, sed jam ne por ĉiuj ceteraj ... Estas la sola, sed grava mia dubo, por senrezerve aliĝi al la opinio de Tišljar (kaj de Frank). Tamen ja decidis, finfine, ne mi, kaj ne ili, sed ja la eŭropuniaj gvidantoj, elitoj ...

Aldone kelkaj vortoj pri la lingvaĵo de la libro. Ial Tišljar uzas kelkajn modern-angla-devenajn vortojn, ne troviĝantajn en la vortaroj. En iuj okazoj ili povas esti utilaj (vere, „resurso”; kial, tamen, ne „resurco”? – ne ĉiam kaj ne ĉie estas „riĉaĵo”), sed kial, ekzemple, la vorton „anarkiismo” anstataŭigi per „subsidiareco”? Kial ne uzi la etnonomon „eŭskoj” anstataŭ „baskoj”, se ne plaĉas (prave) la PIV-a „vasko”? Kial uzi monstraĵon „internet-reto”, kiam jam delonge oni vastege uzas la simplan terminon „interreto”? Eble ĉio tio estas pravigita per personaj meditoj de la aŭtoro, sed tiuokaze necesus klarigi tion al la leganto, kiel ĝis antaŭ nelonge oni sisteme faris en la libroj, donante sur la lastaj paĝoj listojn de uzataj neologismoj kaj nekutimaj signifoj de konataj vortoj.


Nikolao GUDSKOV

Zlatko Tišljar: *Eŭropa ideologio*. Eld. Interkulturo, Maribor, 1998. 70 paĝoj kudre binditaj. ISBN 961-6075-19-5. Prezo ĉe FEL: 6,80 eŭroj + afranko.

Poeto Geraldo kaj Doktoro Mattos

Jam per sia sonetaro *Arĉoj* pruvis Geraldo Mattos, ke li scias verki sonetojn laŭ kaj preter la komandoj de *Parnaso Gvidlibro*. Sed la jaroj pasas, oni evoluas, kaj jen li prezentas al ni novan poemaron kun du malegalaj partoj: *Barbaraj sonoj* (p. 9-58) kaj *Barbaraj sonetoj* (p. 61-78). Paradoxse, la unuan konsistigas soneteskoj, t.e. poemoj kun du kvaroj kaj du trioj, sed sen rimoj kaj mezuroj, sen la sklaveco de rigora metriko (solaj du esceptoj: *La lasta tago* kaj *Aflikta*). Male, la dua enhavas, malgraŭ sia nomo, poemetojn nesonetecajn laŭstrukture. Pri ĉi tiuj mi diru nur, ke ili restas ege sub la beletra nivelo de la unuaj: temas plej ofte pri banalaj strofetoj, foje ŝercaj aŭ blagaj, sed pri kiuj oni sin demandas: kie la poezio? Bonŝance, ni trovas ĝin en la unua parto, kie la poeto esploras per klaraj kaj precizaj vortoj sian lokon en la mondo kaj en la vivo.

Kial „barbaraj”? Neniom da barbareco en ili! Verdire ili devus titoliĝi *Esploraj sonoj kaj sonetoj*. Plurfoje ili sonas kiel liberaj tradukoj el klasika poezio. Oni povas legi ilin kiel fluan prozon kun meditigaj kunmetoj kaj sintagmoj. Kunefikas asonancoj, aliteracioj, kaj nepre atentindaj titoloj, kiel de pentraĵo. Kunkreas kresĉendan atmosferon manpleno da ŝlosilaj vor-



toj, ripetiĝantaj obsede: „tago”, „tagado”, „plu”, „firmamento”, „fantazio”, „ek-”, „nebulo” ...

Mi titolis ĉi tiun recenzon *Poeto Geraldo kaj Doktoro Mattos* tial, ke ĉiam ĉeestas ankaŭ la lingvisto, la akademi-ano, ekzemple, kiam li argumentas favore al la licenco skribi infinitivojn senpere tuj post ajna prepozicio. Tamen jen kaj jen eskapis al lia atento pluraj makuletoj: „editoro”, „*armadiloj”, „*krudele”, „*majora”, „*tormento” anstataŭ la ĝustaj „eldonisto”, „armadeloj”,

„kruele”, „majora”, „tormento”. Kaj, parenteze, mi ne komprenas, kial du el la poemoj havas komencan majusklon ĉiuverse, kontraste kun ĉiuj ceteraj.

Ĉefe en la vokativaj poemoj („alviaj” aŭ „alciaj” t.e. fakte „alŝiaj”) la fino kutime iom platas kaj ŝablonas. Persone mi preferas la mi-rakontajn poemojn kaj strofojn (eble pro mia nekapablo identiĝi kun unu el la vioj aŭ mioj de kelkaj

poemoj). Mattos skribas en *Sentoperdo*, ke „la sento pri la morto nun alestas”, kaj tio, lia proksimiĝo al tia horizonto, estas unu el la gvidaj ideoj de la poemaro. Jes, sentoperdo ... kaj perdosento. Tamen perdo, sed pluvido. Resume, kristalaj versoj kun la sobra voĉo de animo aĝa kaj saĝa kaj, samtempe, konstante juniĝanta.

Jorge CAMACHO

Geraldo Mattos: *Barbaraj sonoj kaj sonetoj*. Eld. Fonto, Chapecó, 2000. 80 paĝoj. Prezo ĉe FEL: 7,50 eŭroj + afranko.

Furoro

Ĉiumonate, la 10 plej furoraj libroj en la Retbutiko
<http://retbutiko.esperanto.be>

1 David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

La kosmo kaj ni Prezo: 18,00 EUR

2 K.J.K. Vroegop

Johano Prezo: 7,50 EUR

3 Anna Löwenstein

dua eldono La ŝtona urbo Prezo: 24,00 EUR

4 August Vermeylen

La migranta judo Prezo: 8,00 EUR

5 Lena Karpunina

La bato Prezo: 12,00 EUR

6 Peter J. Tomson

La afero Jesuo kaj la judoj Prezo: 11,00 EUR

7 Leopold Vermeiren

Brulanta kastelo Prezo: 3,00 EUR

8 Pasporto al la tuta mondo

(parto 9-12) Prezo: 81,00 EUR

9 Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck

Leksikaj ekskursoj (2) Prezo: 14,00 EUR





10 Ulrich Matthias

nova Esperanto: la nova latino de la eklezio
Prezo: 7,95 EUR



Ĉiuj tiuj libroj estas ankoraŭ akireblaj ĉe FEL:
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be
Fakse: + 32 3 233 54 33

Cirkloenigmo



- 1 > 20. Estro de monaĥejo (R)
- 2 > 19. Unu el du nomoj por koksosto (R)
- 3 > 18. Nefakulo
- 4 > 17. Facile surŝoviĝi sur glata supraĵo
- 5 > 24. Subtera parto de planto (R)
- 6 > 23. Indikaĵo (R)
- 7 > 22. Belarta nomo de patrino de Jesuo (R)
- 8 > 21. Estre esprimi sian volon, ke iu faru ion (R)
- 9 > 28. Printempa floro
- 10 > 27. Sankta bildo de ortodoksuloj
- 11 > 26. Metalo
- 12 > 25. Intence erarigi por sia profito (R)
- 13 > 32. Mahometana religio (R)
- 14 > 31. Koscie malbonfarema kontraŭ aliaj (R)
- 15 > 30. Bakaĵo uzata por fari hostion (R)
- 16 > 29. Akre ekkri, kiel vundita aŭ kolereta hundo


(R) = radikvorto

K. ECKSTADT, Germanio

Ĉe ĝusta solvo aperas ĉe numeroj 1 ĝis 8 kaj 9 ĝis 16 titoloj de unu poemaro kaj unu romano de konata esperanta verkisto Julio Baghy. Sendu la du titolojn al nia redakcio antaŭ la 16a de novembro: MONATO (Enigmoj), Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete: jp@fel.esperanto.be

Ne forgesu indiki vian preferatan premion:

- 1) **ABC-gramatiko de Esperanto** (Ch. De Vleminck kaj E. Van Damme)
Moderna ampleksa Esperanto-gramatiko kun temoj ordigitaj alfabete.
- 2) **Morto de sciencisto** (Ronald Cecil Gates)
Krimromano en flua ĉiutaga Esperanto.
- 3) **1887 kaj la sekvo** (Gaston Waringhien)
Eseoj pri diversaj literaturaj temoj.



	K	B	E	
	K	A	R	A
	I	R	A	S
S	E	D	N	O
K	O	S	T	U
Z	K	I	U	J
K	O	P	E	K
T	A	L	O	N
M	A	L	E	A
A	T	E	N	O
S	T	A	R	O
K	A	J	A	T
P	A	J	N	O
N	K	R	E	I
D	E	G	E	L
T	I	R	A	N
N	O	M	R	A
N	A	J	A	D
V	Ŝ	U	N	E
S	O	D	O	M
K	A	N	O	T

Solvo de majo

Komike, sed preskaŭ duone de la solvoj malĝustis, tiel mi nur devas premiigi la alian duonon elektanta jenaj 3 nome: M. Machlik (Norvegio), G. Kvist (Danio), M. Vanek (Ĉeĥio). Gratulojn.

Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo).

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be
TTT: <http://monato.esperanto.be>
Valida anoncarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo.

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg.
Retpoŝto: smaul86150@aol.com

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hector Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Kovats, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Korektanto: Izabel C. Oliveira Santiago.

Grafiko: Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.



MONATO - redaktoroj

Arto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ekonomio: Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio.
Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!)

El mia vidpunkto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com

Enigmoj: Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 59, 4700 Eupen, Belgio.
Reta adreso: jp@fel.esperanto.be

Eseoj: Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

Hobio: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Komputado: Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL.
Reta adreso: edmund@rano.org

Leteroj: Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Reta adreso: guido@fel.esperanto.be

Libroj: Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono.
Reta adreso: kolker@stratos.net

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propralniclate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

Lingvo: YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp

Medio: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Moderna vivo: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com

Noveloj kaj Poezio: Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo.
Reta adreso: mattos@super.com.br

Politiko: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com

Scienco: Haszpra Ottó, Húr u. 9A, III. lph. I/3, H-1223 Budapest.
Reta adreso: haot@freemail.hu

Spirita vivo: Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando.
Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

Sporto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando.
Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ŝerco kaj satiro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio.
Reta adreso: smaul86150@aol.com

Turismo: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio.
Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

Iksoj kaj trefoj

X – ikso, jen la litero, kiu ne apartenas al nia alfabeto, sed pri kiu oni plej parolas, eble ĉar ĝi estas simbolo, signo de nekonato, anstataŭa karaktero, danĝera radiaĵo. Laŭ multaj manieroj ĝi estas objekto de konflikto.

Petrobrás – PetroBrax

Unu el la plej amuzaj konfliktoj okazis en Brazilo dum la eŭforioj de jarfino, ĝuste pro ikso cele al ŝanĝo de la nomo „Petrobrás” al „PetroBrax”. La nomo Petrobrás estas nacia simbolo de 50 jaroj por la brazila nacia ŝtata petrol-kompanio, simbolo por kulto de brazila naciismo. La slogano „o petróleo é nosso” (la petrolo estas nia) estas tre elokventa, same kiel la sigla vorto „Petrobrás” (brazila petrolo).

Neatendite, ekzakte je la 26a de decembro, en plena kristnaska postebrio, oni povis legi en la frontpaĝo de la ĵurnaloj: Petrobrás iĝas PetroBrax. La prezidanto de la kompanio Henri Philippe Reichstul (legu kiel vi povas, brazilanoj ne sukcesas) rapide provis ekspliki la motivojn de la ŝanĝo: „La 50-jara Petrobrás iĝis arkaika, ĝi ne plu kongruas al la tutmondigita merkato, ni ne volas vendi niajn naciajn landaĵojn sed petrolaĵojn al la tuta mondo, la hispanaj kaj anglaj lingvanoj ne kapablas legi la silabon *brás*, multe pli internacia estas la sono *brax*”, ktp, klarigis la prezidanto. Evidente, unu fojon plian, elstariĝis la hegemonio de la angla lingvo, kaj oni rememoris la multnaciajn nomojn kiel Texaco, Exxon, Pemex, Ecex, kie la iksoj abundas kohere kun Brax, ĉu ne?

La 27an de decembro preskaŭ okazis revolucio en Brazilo. Naciisma blovo ciklone leviĝis el ĉiuj medioj ... pro ikso. La povra Reichstul rezignis pri la „modernigo”, kaj postrestas la marko „Petrobrás”, ĝis iuj riĉ-mensaj esperantistoj kun potenca mistiko eble sugestos esperplenan markon kiel „Esperpetrol” tute senpage, ĉar

Reichstul:
neprononcebla.



oni riproĉas al Reichstul la vanan elspezon de 50 milionoj da usonaj dolaroj nur por unu ikso.

La signo X

Por la iniciatinto de nia lingvo por la sono de x sufiĉis ks. Kelkaj tamen diras, ke nia Zamenhofo uzis la ikson tre inteligente: per simpla horizontala tranĉo en la mezo li havis la du supersignojn, kiujn li bezonis – la supran parton por la ŭo kaj la malsupron por la cirkumflekso. Ni scias ankaŭ, ke la geniulo klare, fundamente proponis, ke se pro teknikaj motivoj oni ne sukcesas skribi la supersignon sur la literon mem, oni simple postmetu la literon ho. Kaj la afero bone funkcias de pli ol jarcento.

Bedaŭrinde, ni scias, ke pro la citita hegemonio de la angla lingvo, kiu praktike ne posedas supersignojn, la hegemoniuloj pensis nur pri si kaj enmetis nur signojn por esprimi la anglan lingvon en la modernaj interkomunikiloj kiel Interreto. Notinde, ke en la komputiloj mem tiu problemoj jam estas plene solvita, sen aldono de la litero ho. La inventitaĵo estas iom pli stulta ol la propraj inventistoj, do, ĉar la litero ho ekzistas kiel normala signo, ĝi ne taŭgas por nia fundamenta solvo. Ĉar nia lingvo ne uzas ikson en la alfabeto, sed la interreta sistemo enhavas ĝin, tute logike oni povas programi la stultajn aparatojn, por ke ili akceptu la signon X kiel supersignon. Temas pri simpla artifiko... ja povas esti aliaj, artifi-



koj, sen iluzio aŭ trompo (por ĝustigi la difinon de la vortaro). Ne komprenebla afero estas la perdo de tempo, la senfinaj diskutoj kaj disputoj inter laŭdire inteligentaj homoj en ĉiuj anguloj de nia tergloba pseŭde utilaj.

Trefoj kaj Bofrontoj

Estas konstateble, ke ĉiu homo, kiu havas kontakton kun Esperanto, arogas al si la rajton perfektigi ĝin. De la fruaj tempoj ĝis hodiaŭ pli kaj pli svarmas la bofrontoj, kiuj daŭre provas damaĝi la bonan funkciadon de nia lingvo, de la lingvo de MONATO, kiu feliĉe ekzistas por klerige montri, ke Esperanto funkcias.

Ne interesas scii, ĉu Esperanto estas perfekta aŭ ne, laŭ senutilaj (por uzado) lingvistoj, lingvistikistoj, filologoj, esperantologoj; interesas nur la fakto, ke nia lingvo perfekte funkcias; ĝi do ne bezonas „help-alfabeton” aŭ tute alian alfabeton, kiel insiste prezentas per senfina galimatia iu „Trefo”, bulteno de iu „Trenha”, terure, sub gvidado de influa eksprezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu feliĉe tiam klopodis respektivan fundamenton. Esperanto ne estas ludilo, kartludo kun trefo, aso, piko, kero kaj karoo, per kio oni laŭplaĉe friponas.

Estas tempo, ke tiuj, kiuj ŝatas la anglan, iru al ĝi; estas tempo, ke tiuj, kiuj ne ŝatas Esperanton, forlasu ĝin. Estas ankaŭ tempo, ke la seriozaj uzantoj de Esperanto atentu pri la virusaj iksoj kaj trefoj kaj urĝe starigu „fronton kontraŭ bofrontoj”.

Gilbert LEDON

— anoncetoj —

Por prezenti Esperanton dum urba forumo, la 29/09/01, nia grupo ŝatus ricevi bildkartojn kun salutvortoj el plej diversaj landoj. Antaŭdankon. Jean-Yves SANTERRE, Duret, 44410 HERBIGNAC, Francio.

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto **FONTO** en januaro komencis sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj partoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega *fonto* de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.


Naturista Vivo, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, lhász Fő u. 41/5 HU-8531, rete: jozefo@nl-papa.hu.

Internaciisto: Organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK). Ĝi aperas ĉiun duan monaton. 16-paĝa D-A4. Ĝia enhavo temas pri socialismo kaj komunismo. IKEK akceptas rilatojn kun aliaj organizaĵoj samcelaj. Interesiĝantoj petu provkzempleron: Internaciisto, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Hispanio).

Sen la plej

KONTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2001 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj



ABONTARIFO 2001

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugalio	3200 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2000 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	27 dolaroj	Usono	18 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo

Iun tagon, Bruno kaj Maryvonne Robineau forlasis sian farmon en Francio por migri ĉirkaŭ la mondo dum ok jaroj, por iri renkonten al la homoj, dividante ilian laboron kaj ilian ĉitutagan vivon.

Ili rikoltas lentojn en hinda vilaĝo, iniciĝas al la te-ceremonio en Japanio, partoprenas geedziĝfeston en kanaka tribo de Nov-Kaledonio kaj spertas mortminacon en Gvatemalio.

La zamenhofa lingvo malfermis al ili la intimecon de multaj familioj. Bela homkolektado ekde ĉina kamparano ĝis bulgara oficiro, tra hungara instruisto aŭ japana kadrulo.

Fascina verko, kiu spiras kortuŝan homaramon kaj homecon.

(G. MacAoidh en Monato)

Ili vivis sur la tero. 1998. Mendebila ĉe FEL kontraŭ **17,87 €** + afranko.

Jes, laŭ instigo de mia amik(in)o, kies nomo troviĝas je la dorsa flanko de tiu ĉi karto mi abonas la revuon (laŭ abontarifo en p. 2). La ankoraŭ aperontajn numerojn de la 22a jarkolekto mi ricevos senpage.

nomo _____
adreso _____
lando _____
dato _____

subskribo

Sendu la karton al

MONATO

Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

Mi pagas laŭ jena vojo:

mi volas aeran alsendon

per internacia poŝtmandato je la nomo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Mi ĝiros la pagon al poŝtĉekkonto BE66 0000 2653 3843

Mi rajtigas vin debeti mian VISA/MASTERCARD-konton (bonvolu aldoni la kartnumeron kaj ties validodaton)

Mi pagas pere de UEA-konto al la konto fela-x kun mencio mona-x.

Mi havas konton en usona banko kaj kunsendas ĉekon en usonaj dolaroj je la nomo de Flandra Esperanto-Ligo.

la 23a jarkolekto de

Monato

2002

baldaŭ naskiĝos. Reabonu la revuon frue!

Helpu al MONATO ...

Baldaŭ la nuna jarkolekto finiĝos. Por doni al via peranto kaj la eldonanto sufiĉan tempon por akurate administri vian abonon

bonvolu jam nun reaboni

laŭ via kutima vojo.

Per frua reabono, antaŭ la 1-a de novembro 2001, vi krome evitas eventualajn novjarajn prezaltiĝojn pro kreskantaj preskosto kaj a frankotarifoj.

La redaktora skipo kaj la eldonejo dankas!

Helpu al MONATO plivastigi sian abonantaron.

Por povi sin vivteni MONATO nepre bezonas pli da abonantoj. Tamen sondi internacian merkaton de Esperantoparolantoj estas malfacila tasko. Tial ni petas vian helpon. Instigu amik(in)on aboni la revuon por la jaro 2002 kontraŭ la abontarifo valida en ŝia/lia lando (vidu p. 2). Kiel instiganto, vi ricevos donackarton je la valoro de EUR 5,00.

Transdonu tiun-ĉi karton al via amik(in)o. Ne forgesu kompletigi la subajn donitaĵojn, por ke ni povu sendi al vi la donacokarton.

Mi (nomo) + fel-kodo

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon



Mendu la PAL-version ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Tel:+32 3 234 34 00

Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4:

81 EUR + afranko

Prezo de lecionoj 5 ĝis 8:

81 EUR + afranko

Prezo de lecionoj 9 ĝis 12:

81 EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne bremsas la

disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj